

ISSN 0032-4361

3


1990


中國報

EL POPOLA

CINIO









INTER NI

Mi havas rimarkon al solvoj por konkurso de EPC-amikoj. Al demando 11 vi presis (Ĉarhan). Interalie en artikolo "Vojaĝo en Ĉinghaj-provinco", la aŭtoro Li Ĉjang skribas (n-ro 11/1988, p. 46) "Ĉinghaj-lago kun areo de 4 600 kvadrataj kilometroj... estas la plej granda sallago de Ĉinio", tamen la aŭtoro Lan Ŝan en artikolo "Ĉinaj Salolagoj" skribas (n-ro 11/1988, p. 65) "La areo de Ĉarhan-salolago sur Ĉajdam-baseno estas 1 600 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej granda salolago en Ĉinio." El ĉi tiuj artikoloj mi vidas, ke la plej granda salolago de Ĉinio estas Ĉinghaj-lago (kun areo de 4 600 kvadrataj kilometroj).

VASILJEV O. A.
(Sovetio)

Nia redakcio ricevis leteron de Vasiljev kaj ankaŭ de aliaj legantoj pri sallago de Ĉinio. Pro tio ni konsultis fakulojn de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Sube estas iliaj klarigoj.

Analizo raportas, ke ĉiu litro da akvo en Ĉinghaj-lago entenas malpli ol 50 g. da salo, kaj tiu de la duonseka Ĉarhan pli ol 50 g. Laŭ fakuloj de iuj landoj, la antaŭa nomiĝas duonsalakva aŭ salakva lago, dum la lasta sallago. Ĝis nun la diverslandaj sciencistoj ankoraŭ ne venis al la fina komuna opinio por klasifiki tiajn lagojn. Kaj sciencistoj de iuj landoj nomas lagon entenantan pli ol 50 g. da salo en ĉiu litro sallago.

Nia gazeto skribis, ke Ĉinghaj-lago estas la plej granda salolago de Ĉinio kaj Ĉarhan estas la plej granda salolago de Ĉinio. Tio estas neĝusta, ĉar "sallago" kaj "salolago" ne havas evidentan diferencon. Por diferencigi ilin, ni opinias, ke la antaŭa estas salakva lago kaj la lasta — sallago. Estas pli ĝuste, ke ni nomu Ĉinghaj-lagon la plej granda sallago de Ĉinio.

Ni sincere petas, ke niaj legantoj ĉiam elmetu siajn opiniojn kaj kritikojn pri nia laboro.

La Red.

ENHAVO

- 10 **Granda ŝtata entrepreno**
- 6 **Urbetoj sude de Yangzi-rivero**
- 46 NIA MONDO: La purpura lando Urugvajo
- 16 INTERVJUOJ: Konkologo Xin Qitai
- 52 LA IMPERiestra PALACO (8):
Jiaotai-halo, Kunning-palaco kaj edziĝo de imperiestroj
- 23 Teatra lernejo funkciigata de kamparanoj
- 41 ĈINA LITERATURO:
Pu Songling kaj lia "Strangaĵoj de Liaozhai"
Qingfeng (El la novelaro "Strangaĵoj de Liaozhai")
- 48 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (10): Rivera vojo
- 40 AMUZOJ
- 39 "Ora ŝlosilo" por memorado
- 26 SUR NIA LIBROBRETO: Manĝu por sano
- 37 POR VIA SANO: Korposanigaj metodoj (XII)
- 27 POEMO • KALIGRAFAJO • PENTRAJO:
Pri "Bambuo sur Roko"

18 Tolstoj kaj Esperanto

20 ESP-NOVAĴOJ

45 POR KOMENCANTOJ: Kiu estas la vera posedanto de la silko?

4 INTERNI

32 **Por la 11-a Azia Sportkunveno**

21 Zamenhofa festo en Pekino

22 25-jara jubileo de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

30 KURANTAJ AFEROJ

38 KORESPONDI DEZIRAS

SUR LA KOVRILLO:

Nova ujugura dancistino Paŝa Umar

Foto de **WU XINHUA**

2 **Shaoxing**

Foto de **CHEN XIN**

Shaoxing, kiel kultura urbo en la ĉina historio, situas sur ebenaĵo de norda Zhejiang-provinco. Tie ĉarmas pejzaĝo kaj progresas ekonomio kaj kulturo. Shaoxing fondiĝis en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.), kaj la Suda Song-dinastio (1127-1279) prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. En la lastaj jaroj, kun la disvolviĝo de agrikulturo kaj industrio, ĝi fariĝis malfermita urbo por aliaj landoj.

4 **Kampoj en printempo**


Foto de **HUANG LUKUI**

SUR LA DORSKOVRILO:
[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Umefloroj

LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Suzhou
2. Xuanhua-gubernio
3. Rushan-gubernio
4. Jinzhou



Urbetoj sude de Yangzi-rivero



Teksto de ZHANG QINGZHEN Fotoj de LIU SIGONG




Boatisto

Ponteto, rivereto kaj loĝdomoj





Surakva scenejo



Matena foiro ĉe rivero

Sur strato de urbeto



S UZHOU-REGIONO sude de Yangzi-rivero ne nur estas abunda je fiŝoj kaj rizo, sed ankaŭ distingiĝas per siaj trajtoj, moroj kaj kutimoj. Aŭtune de 1989 mi vizitis la urbetojn Tongli kaj Shengze en la suda ekstremo de tiu regiono. Ili impresis min profunde.

ANTIKVA URBETO SUR AKVO

Tongli, antikva urbeto sur akvo, situas sude de Suzhou je ĉ. 26 km. Tie, araneaje kruciĝas riveretoj, kies bordoprotektaj ŝtonmuroj estas puraj, bonordaj kaj belaj, kaj ambaŭborde troviĝas lignoframaj duetaĝaj domoj. Ŝtonaj arkpontoj kaj kajoj staras unu post alia, antikvastilaj tetrinkejoj, restoracioj kaj butikoj laŭvice borderas mallarĝajn gruzajn stratojn. La urbeto aspektas modesta kaj antikva.

En Tongli, ĉirkaŭita de 5 lagoj, estas multaj riveretoj kaj pontoj. Starante sur iu ponto, mi rigardis la malsupran parton de la rivereto kaj vidis tri originalajn pontetojn, lunarkan, ferbetonan kaj ŝtonplatan. Iu ŝtona arkponto kun grim pantaj hederoj similas al arka pordo dekoraciita en festa tago.

Kiam tra ĝi veturas boatoj, la pendantaj hederoj ŝvebis en vento. Min ravis la pontetoj, fluanta akvo kaj simplaj domoj.

Tongli, kun historio de 4 500 jaroj, havas 54 pontojn. Estas bone konservitaj la pontoj konstruitaj en la dinastioj Song, Yuan, Ming kaj Qing (960-1911). Ambaŭflanke de nemalmultaj el ili estas videblaj ŝtongravuritaj poemoj pri lokaj moroj, kutimoj kaj historio. Sur la suba flanko de ŝtonplato de iu ponto de Yuan-dinastio vidiĝas vivece kaj subtile gravurita drako. Sur ponto de Ming-dinastio estas gravuraĵo pri karmo en transsaltado de draka pordo. Legendo rakontas, ke kiam la karmo transsaltas la drakan pordon, iu belulino trapasas la ponton. Ŝin vidinte, ĝi ekamis ŝin. Tial, ĝi lasis la mirigan figuron nek drakan, nek fiŝan.

Tieaj pontoj plejparte estis nomataj laŭ lokaj moroj, kun signifo de bonŝanco al komercistoj kaj bondeziro al pasantoj. Laŭkutime la novaj geedzoj pasis tra la pontoj por peti favoran aŭguron. Iuj antikvaj pontoj estas gardataj, ĉe ambaŭ finoj, de paro da ŝtonaj leonoj por forpeli demonojn kaj malbonojn,

Loĝdomoj en la urbeto



tio estas antikva tradicio de ĉinoj en ornamado de pontoj.

Kiam mi pasas tra iu ponto, kies ambaŭflankaj apogiloj konsistas el du longaj seĝoj, mi pretervole laŭdis: “Kiel zorgemaj estis la konstruantoj, la pasantoj povas paŭzi ĉi tie.” “Ne nur por paŭzi”, iu pasanto diris al mi, “tie estas agrabla loko por refreŝigi kaj ripozi.”

Tongli estas ankaŭ antikva kultura urbeto. Tie estis admirindaj historiaj rakontoj kaj naskiĝis nemalmultaj literaturistoj, ili plejparte fariĝis ŝtataj altranguloj en aliaj lokoj. Reveninte al la hejmloko poste, ili konstruis belajn domojn tie por honorisiajn prapatrojn. Tial ĉi tie estas centoj da familioj de iamaj altranguloj. Mi vizitis kelkajn el ili. Ili donis al mi la impreson, ke la akvolandanoj neniam forgesis akvon eĉ en domkonstruado, ili konstruis domojn laŭ akvejo aŭ beligis la lokon per akva pejzaĝo.

MATENA BAZARO DE TONGLI

Antaŭ tagiĝo, aŭdiĝis paŝado sur ŝtonplataj vojoj ĉe riverbordo. Tio anoncis, ke kamparanoj ĉirkaŭ la urbeto venis vendi legomojn. Sendube, ili venis per barkoj. Albordiĝinte, ili unue prenis teon kaj kukojn en restoracio, babilis pri legomaj prezoj de la bazaro kaj informiĝis pri novaĵoj de la urbeto. Je la tagiĝo, ili ekvendis legomojn ĉe stratoj. En la lastaj jaroj prosperis la kampara ekonomio kaj pli kaj pli multiĝis strataj vendantoj.

La loĝantoj sude de Yangzi-rivero havas kutimon iri al bazaro frumatene por aĉeti legomojn. Iumatene mi rimarkis, ke kelkaj virinoj staras ĉe rivero. Proksimiĝinte al ili, mi vidis barkon plenan de kokoj kaj anasoj. Iu virino diris: “Mi volas kokinon.” Alia kriis: “Mi deziras grasan anason!” Tia sceno vidiĝas nur en akvolando.

En la matena bazaro, la plej homoplena loko estas fiŝvendejo formita de vico post vico da lignaj kuvoj, tinoj kaj korboj, en kiuj viglaj salikokoj kaj diversspecaj fiŝoj altiras multajn aĉetantojn.

Ĉe la fino de la fiŝvendejo kelkaj virinoj fortranĉas la pinton de limneoj, la bruo altiras multajn klientojn. La loĝantoj sude de Yangzi-rivero ŝatas preni limneojn kiel almanĝaĵon en drinkado. Mi memoras, ke en mia infanaĝo mia patrino ofte aĉetis limneojn kaj manĝigis al mi ilian karnon freŝan kaj bongustan.

ANTIKVA MORO

Kiel Tongli, ankaŭ Shengze estas urbeto en Suzhou-regiono, kun silko kiel sia ĉefa produkto. La bonkvalita Shengze-a silko havas longan historion. Dank’ al tio, Shengze-anoj vivas riĉe.

Laŭdire, Shengze-anoj havas kutimon okazigi kapo-razan bankedon por unumonata bebo. Por in-

formiĝi pri tio, mi interesplene venis en Shengtian-vilaĝon sub Shengze.

Oni diris, ke antaŭ kelkaj tagoj vilaĝano Ma Hai-gen faris kapo-razan bankedon por sia nepo.

Je mia pridemandado, kun granda plezuro vilaĝano sciigis detale al mi tion. Tiutage, la patrin-flanka avino kaj aliaj parencoj de la bebo donacis al ĝi kokojn, anasojn, fiŝojn, viandon, kukojn, bombonojn, jujubojn, orangojn, vestojn, ŝuojn, ŝtrumpojn, longvivigan seruron, Guangong-glavon, rondan spegulon kaj aliajn arĝentaĵojn kun malsamaj signifoj. Ekz., la ronda spegulo kaj la Guangong-glavo povas forigi demonojn; la longviviga seruro signifas, ke kun ĝi sur la kolo la bebo povos vivi cent jarojn.

En la vasta kaj hela centra halo lumis ruĝaj kandeloj, ŝvebis incensa fumo, kaj du rondaj tabloj estas plenaj de diversaj manĝaĵoj kaj donacoj. La avo enbrakigas sian nepon kaj sidiĝas antaŭ la tablo kaj la razisto komencis razi al la bebo la harojn en petarda bruo.


La razisto devas restigi al la bebo kvadratan pecon da haroj super la frunto, nome “saĝaj haroj”, kaj tufon da haroj en la malantaŭa parto de la kapo, nome “haltigaj haroj”. En la akvolando oni haltigas ŝipon per bambua stango, enpremita en riveran fundon. Tiu bambua stango nomiĝas “haltiga stango”. Oni restigas al la bebo tufon da haroj, esperante, ke li haltos kiel boato antaŭ ĉiuj akcidentoj kaj sane kreskos. Oni razis la brovojn al la bebo, por ke ili kresku dense.

Post la razado, la patrino vestis sian bebon kaj metis ĝin en la sinon de lia kuzo de pli ol 10 jaroj, kiu devis iri kun ĝi en la kuirejon kaj sidi momenton sur brulpajlo apud la kameno. Tio signifas, ke de tiam la bebo ne timos antaŭ fremduloj, ĉiu ajn povos lin gardi, ke la patrino estos liberigita kaj povos fari aliajn laborojn. Sidi sur brulpajlo signifas, ke la bebo kreskos facile kiel kato kaj hundo, kiuj bone vivas kaj neniam malsaniĝas. Estas ne mirige, ke la lokanoj nomas sian infanon hundeto aŭ kateto.

Post la raza ceremonio, oni transmetis la manĝaĵojn en la kuirejon por prepari bankedon. La geavoj de la bebo donacis al najbaroj bombonojn kaj fruktojn, por ke ili kune ĝuu la feliĉon kaj ĝojon.


Pasintece, oni preparis kapo-razan bankedon nur por knabo. Nuntempe, oni rompis tiun malnovan moron. En la lastaj jaroj la ŝtato praktikis naskolimigon, juna geedza paro havas nur unu infanon, rigardante ĝin kiel trezoron, ĉu ĝi estas filo aŭ filino. Tial multaj familioj organizis la bankedon ankaŭ por knabino.


En la malnova socio, per tio la lokanoj metis sian bondeziron sur la infanojn. Nuntempe, la loĝantoj plejparte rigardas tion nur kiel moron. ■



Granda ŝtata entrepreno

Fabriko de la korporacio en nokto





Instalaĵo por metafenolo de la korporacio, la plej granda en la mondo

Teksto de DA WEI kaj SHUI PING

Fotoj de XIN HUA kaj SUN YI

Parto de la korporacio



En farejo de kemifibraĵaj tapiŝoj



Laboristoj, kiuj prezentas bonan proponon



La Yanshan-a Petrola Kemi-industria Korporacio de Pekino estas la plej granda kombinato de petrolo kaj kemi-industrio de Ĉinio kaj ludas gravan rolon en ĝia nacia ekonomio. Kiel ĝi tenis sian prosperadon en la lastaj 20 jaroj? Vi povas trovi la respondon en la jeno.

INTER la pintoj de Yanshan-monto 50 km sudokcidente de Pekino sin trovas argenta konstruaĵaro el olerafinaj turoj, cisterno kaj duktoj. Ĝi estas la Yanshan-a Petrola Kemi-industria Korporacio de Pekino.

Direktoro de la korporacio Wu Xiegang en sia oficejo konigis al ni: "Dank' al granda investo de la ŝtato, nia korporacio havas la nunan skalon. Kiel granda entrepreno inter la samspecaj, ĝi ludas gravan rolon, kiam la ŝtato alfrontas ekonomiajn malfacilojn, tio estas devo plenumenda por ĝiaj gvidantoj, oficistoj kaj laboristoj. Nur tiel, ĝi meritas sian pozicion en la nacia ekonomio."

De 1969 ĝis 1989 la entrepreno

Direktoro Wu Xiegang



kreis totalan industrian produktovaloron de 389 milionoj da juanoj, donis al la ŝtato imposton de 19.5 miliardoj da juanoj, pli-ol-4-oble pli multe, ol kiom investis la ŝtato. En la lastaj du jaroj ĝiaj imposto kaj profito okupis la trian lokon en la lando. En la pasintaj jaroj aperis portempaj malfaciloj en la ĉina ekonomio, kaj ankaŭ la entrepreno spertis grandegan premon de manko de kapitalo kaj energio, prezaltiĝo de krudaj materialoj kaj nesufiĉeco de trafika povo. Tamen ĝi ankoraŭ tenis sian prosperadon en produktado.

ĈENLABORA SISTEMO

Kiam ni venis en la etilenan laborejon de la Unua Kemi-industria Fabriko kun produktopovo de 300 000 tunoj da etileno, duktoj, diversaj turoj kaj fornoj saltis en niajn okulojn. Etileno estas grava kemi-industria materialo kaj ĝiaj produktaĵoj vaste uzigas en agrikultura produktado, popola vivo, naciddefenda konstruado k.a. Ĝia produktopovo markas industriaran nivelon kaj ekonomian evol-

uon de lando. Importinte tiujn ekipaĵojn depost 1973, la korporacio jam ekposedis iagrade teknikon por produkti etilenon. Ni informiĝis, ke la 4 kompletoj da grandaj etilena ekipaĵoj estis konstruitaj de Ĉinio en la pasintaj jaroj, dank' al la helpo de la korporacio.

El karbono 4 produktita en etilena ekipaĵo oni faras sintezan kaŭĉukon. La Fabriko de Sintezo Kaŭĉuko sub la korporacio estas la plej granda fabriko de butadiena kaŭĉuko en Ĉinio, kun jara produktokvanto de 55 000 tunoj, kiu konsistigas pli ol duonon de la totala produktokvanto de la lando. Ni vidis en la laborejo, ke 3 aŭtomataj produktolinioj purigas, senakvigas kaj grajnigas kaŭĉuklikvaĵojn. Post dilato, sekigo kaj peso la grajnoj estas kunpremitaj en masojn, kiuj estas senĉese portataj sur la paklinion. Ĉe tio kaŭĉuko estas neĝblanka kaj varmeta. Ni informiĝis, ke la butadiena kaŭĉuko kun marko Yanshan 3 sinsekvajn fojojn gajnis oran premion de kvalito donitan de la ŝtato. Ĝi havas grandan debiton ne nur enlande, sed vendiĝas ankaŭ en 16 landoj kaj regionoj, kiaj Japanio, Usono, FR Germanio kaj Sudorienta Azio.


La Yanshan-a Petrola Kemi-industria Korporacio de Pekino ekleviĝis per olerafinejo konstruita en 1969. Dank' al vasta importado de tekniko, ĝi mem projektis, fabrikis kaj muntis 54 kompletojn da grandaj instalaĵoj por petrolo kemi-industrio sur montvalo kun areo de 36 kvadrataj kilometroj, kaj formiĝis ĉenlabora sistemo el olerafina instalaĵo, kemi-industria instalaĵo kaj fibrotekstila instalaĵo. Sub la korporacio funkcias 7 fabrikoj, 8 kompanioj kaj aro da scienc-esploraj fakoj kaj akcesoraj fabrikoj, kun 45 000 laboristoj kaj oficistoj. Ĉiujare ili prilaboras 7 milionojn da tunoj da nafto, produktas 193 markohavajn kemi-industriaĵojn de 86 specoj kaj 5 milionojn da kvadrataj metroj da kemi-fibra tapiŝo. Krome, la korporacio ankaŭ liveras gason al 1.2

milionoj da familioj de Pekino.

GRANDA SPACO POR LATENTA FORTO

La korporacio frue importis teknikojn, la produktopovo de la nunaj produktaj instalaĵoj atingas la projektan valoron aŭ proksimiĝas al ĝi, kaj la instalaĵoj malnoviĝas, tial la latentaj fortoj por pliiĝi produktojn estas limigita. Pro tio, la korporacio postulas teni la nunajn instalaĵojn en produktado sekura, stabila, longperioda kaj plensarĝa, por plilongigi validan tempon por produktado. Antaŭe, ĉiujare, la instalaĵoj por produkti etilenon, polietilenon, polipropilenon kaj butadienon devis ĉesi labori por dekoj da tagoj por ripari. Dank' al adopto de eminenta riparprojekto, la kvalito de riparado plialtiĝis. Ili faras grandan riparadon alterne en du jaroj, sekve, ŝpariĝas nemalmulta tempo. Se tiuj instalaĵoj produktas pli je unu tago, ili povas krei profiton de pli ol 2.6 milionoj da juanoj.

Pro sia propreco, petrola kemiindustrio posedas avantaĝojn ekde pli bonan produktan projekton kaj teknologian parametron, ordigi produktajn strukturon, praktiki superan projekton ktp. en produktado. Laŭ tiu propreco la rafinejo turnas sian atenton sur la ordigon de produktaj strukturo kaj produktas altvalorajn produktaĵojn. Ekz. en 1988, utiligante la proprajn kondiĉojn de materialoleo, ĝi plibonigis la teknologion, ordigis ĝian parametron kaj produktis 46 000 tunojn da altkvalita lubrikaĵo kaj pliiĝis 26 milionojn da juanoj da profito. Post plibonigo de la instalaĵo por produkti fenolan acetanon reduktiĝis laborĉesoj kaŭzitaj de la korodiĝo, pliiĝis 7 400 tunoj da produktaĵoj kaj rikoltiĝis 12 milionoj da juanoj da profito.



Ĉinaj kaj alilanda teknikistoj en muntado

LA PROJEKTO SBS

Komence de la ekspluatado de latentaj fortoj kaj pliproduktado, la gvidantoj de la korporacio bone konsciis, ke necesas akceli scienc-teknikan progreson por ĝin disvolvi.

En la instituto sub la korporacio, ni aŭdis pri la projekto SBS. SBS estas nova altpolimero inter kaŭĉuko kaj plasto. La el ĝi faritaj plandumoj karakteriziĝas per elasteco, frotrezisteco kaj fortikeco. Ĝi estas unu el la gravaj materialoj por la ŝufara industrio en la mondo. Post sia apero en la 60-aj jaroj la materialo vekis la atenton de diversaj landoj. La instituto sub la korporacio prenis provfaradon de SBS kiel sian ŝlosilan scienc-teknikan projekton en 1979. Post plurjara esplorado kaj eksperimentado, en 1984 ĝi trapasis teknikan ekspertizon, per unu fojo sukcesis en provproduktado de industria instalaĵo kaj akiris la unuan premion de pekina scienc-teknika atingo. Informiĝinte pri tio, la itala elastomera kompanio Enichem, la plej granda el la tiaspecaj kompanioj

en Eŭropo, venis aĉeti la teknikon de SBS post traktado. Por konfirmi, ke la tekniko estos internacie unuaranga, ĝi speciale elektis specimenojn de SBS kun 5 markoj, la plej bonvenajn en la eŭropa merkato, kaj postulis, ke la Yanshan-petrola kemiindustria korporacio reproduktu ilin laŭ koncernaj tekniknormoj. Pasis nur 15 tagoj, la korporacio kontentigis ĝian postulon. Rezentanto el la elastomera kompanio Enichem senhezite subskribis la transigan dokumenton. SBS fariĝis la unua petrola kemiindustria tekniko transigita de Ĉinio al alia lando.

Ekde 1978 ĉ. 6 000 diversfakaj teknikistoj de la korporacio faris multe da esploraj laboroj. Ili ekspluatigis pli ol 160 novajn teknikojn, el kiuj 54 gajnis ŝtatan, ministerian aŭ urban premion de eminenta scienc-teknika atingo. Samtempe, ili starigis kunlaboran rilaton kun minimume 100 scienc-esploraj institutoj en- kaj eksterlandaj kaj akiris nombron da scienc-esploraj atingoj en moderna administrado, mediprotekto, energiŝparado, kemi-industriaj tek-

nikoj k.a. Dank' al disvastigo kaj aplikado de katalizilo, produktita de Ĉinio, ĉiujare pliigas almenaŭ 20 milionoj da juanoj da ekonomia profito. La progreso de scienco kaj tekniko akcelis entreprenan administradon kaj ankaŭ altigis la totalan ekonomian profiton. Nun la produktovaloro kaj imposto kreitaj per prilaboro de unutuna nafto trione pli multe altiĝas ol tiuj en la 70-aj jaroj.

ĈIUJ ZORGAS PRI LA ENTREPRENO

Iu pekina ĵurnalo raportis: En la lastaj 2 jaroj la laboristoj kaj oficistoj de la korporacio iniciateme solvis malfacilojn por la entrepreno, dividis malĝojn kun la ŝtato kaj donis 50 000 raciajn proponojn kaj teknikajn renovigojn, el kiuj 5 337 efektiviĝis en produkta administrado kaj kreis ekonomian profiton de 90 milionoj da juanoj.

En la teknika sekcio de la korporacio 2 mezaĝaj inĝenieroj kun ekscitiĝo diris al ni pri tio.

En la 70-aj jaroj la korporacio iniciatis la aktivadon por doni raciajn proponojn kaj teknikajn renovigojn. En la lastaj jaroj la korporacio alte taksis kulturadon de devokonscio de la laboristoj kaj oficistoj, direktis la aktivadon, administris sur 3 niveloj (korporacio, filio kaj laborejo) kaj ellaboris kompare raciajn premiajn rimedojn. Dank' al tio, la aktivado plivigliĝis kaj aperis nova formo por demokratie administri entreprenon.


Vicestro Wang Tieli de la dua kataliza kaj kreviga laborejo de la rafinejo konigis, ke ĉiujare antaŭ la ĝenerala riparado de la instalaĵoj ilia laborejo kunvokas la laboristojn kaj oficistojn por prezenti problemojn ekzistantajn en la produktaj ĉenoj kaj teknologia cirkulado, antaŭ ol ilin solvas la administra grupo. Pasintecce parto de alttemperatura gasdukto de la laborejo brultruiĝis dekojn da fojoj ĉiujare, laboristoj devis ripari ĝin en ekstreme danĝera kondiĉo, kaj la 650°C-a gaso karbigis iliajn asbestajn gantojn. En 1987 kelke da

laboristoj prezentis renovigan projekton. Post esplorado de la administra grupo, oni faris renovigon al tiu ĉi gasdukta parto, ĝis nun ankoraŭ ne okazis brultruado. Ni informiĝis ankaŭ, ke en 1987-1988 la rafinejo akceptis 6 700 raciajn proponojn pri teknologio, energiŝparo, mediprotekto, sekura produktado, el kiuj 700 efektiviĝis kaj la ekonomia profito atingis 13.4 milionojn da juanoj.

Cai Changjiang estas direktoro-inĝeniero de la fenola laborejo de la Dua Kemi-industria Fabriko. Kiel fenola fakulo, li havas specialan senton al la instalaĵo. Li prezentis pli ol 100 renovigajn proponojn en 2 jaroj. Dum produktado de fenola acetono oni devis enlasi nitrogenon en dekelkajn cisternojn por ilin protekti. Nitrogeno, kiel protekta gaso, estas nemankigebla por multaj grandaj instalaĵoj de la korporacio, kaj samtempe malfacile aĉetebla. Ĉu povas esti sen ĝi? Cai vidis post profunda esplorado, ke tio celas preventi cisterno-eksplosion estigitan de eniro de aero kun multa oksigeno. Nitrogeno povas esti anstataŭigita per gaso kun malpli-ol-10-procenta oksigeno, kaj la oksida vostgaso produktita en farado de fenola acetono entenas nur ĉ. 4% de oksigeno. Sekve, li proponis substitui oksidan vostgason al nitrogeno. Por tiu renovigo oni elspezis nur 400-500 juanojn, kaj ŝparas ĉiujare 800 000 juanojn.

La moderna entreprena administrado aparte baziĝas sur disvolvo de la pozitiva faktoro de la homo. La korporacio disvolvas amasan aktivadon por kolekti raciajn proponojn inter la laboristoj kaj oficistoj, kun la celo kulturi en ili la mastran devokonscion por partopreni en konkurado, la spiriton por unuanime venki malfacilojn, kaj tiel ĉiuj laboristoj kaj oficistoj plene disvolu sian talenton. Direktoro Wu de la korporacio kun emociiĝo diris: "Entrepreno bone funkcios, se nur ĉiuj ĝiaj laboristoj kaj oficistoj zorgas pri ĝi."

Cai Changjiang (meze) kaj laboristoj



DISVOLVIĜAS PRODUKTADO SEN PLIA KONSUMO DE ENERGIO

Ekde sia fondiĝo la korporacio havas striktan rilaton kun energio. La materialo estas energio, produktado bezonas energion, kaj ankaŭ la produktoj plejparte estas energio. En 1979 la korporacio konsumis kinetan energion egalan al 1.29 milionoj da tunoj da norma oleo, kiuj konsistigis 3% de la totala energio de la lando.

En 1979 la korporacio komencis batalon kontraŭ malŝparo de energio, kiu ankoraŭ daŭras eĉ nun.

Antaŭ ĉio, la korporacio, kombinate fakan enketon kun ĝenerala amasa esploro, plenumis la unuan ĉiuflankan enketadon pri varmo-energio kaj kontrolon de energikonsumo. Tuj poste, la korporacio starigis energiŝparan gvidgrupon kaj fakajn energi-administrajn sekciojn, fondis energiŝparan organizaĵon kaj prenis energiŝparajn rimedojn. Ili ŝparas akvon, elektron, gason, oleon kaj varmon. Jen aperis mirigaj faktoj: post efektiviĝo de 750 energiŝparaj rimedoj, la korporacio kreis rekordon en pli-produktado kaj malaltigo de energikonsumo en 10 sinsekvaj jaroj. En 1988 la produktovaloro kreskis je 66.7%, sed la energikonsumo por ĉiu dekmiljuana produktovalore reduktiĝis je 40.8%, ŝpariĝis sume 640 000 tunoj da norma oleo, kompare kun 1979. Tio ja estis laboro peniga sed fruktodona.

Nun ni konigu al vi la batalon por teni varmon de la termika duktoreto.

La subĉiela duktolinio de la termika sistemo de la korporacio longas je 1 000 km. Antaŭ kelkaj jaroj, en vintro, preskaŭ ĉiuj termikaj duktoj ellasis gason pro nebona varmokonservado. Eĉ aŭdiĝis siblado el duktofendetoj en nokto. La plej granda larĝo de fendo sur varmokonserva briko de dukto atingis eĉ 6-7 cm.



Forno konstruata

La termodinamika sekcio fondis esploran grupon. Post malpli ol unu monato ĝi akiris centmilkelkajn donitaĵojn kaj bone sciis la laboron de la termika duktoreto de la tuta korporacio. Tuj poste, ĝi disvolvis amasan batalon por ripari difektitajn duktojn kaj protekti nudajn duktopartojn. Ĉiuj partoprenis en ĝi, ĉu junaj laboristoj, ĉu oficistoj, ĉu familianoj, ĉu lernantoj kaj kuracistoj. La sekcio faris kalkulon: Kelkaj juanoj jam sufiĉas por veldi unu fendeton, sed sen veldado ĉiuj duktoj vane ellasas 2 170 tunojn da gaso en la jaro. La monsumo por ripari 1-metran dukton estas meznombro 200 ju-

anoj, sed la perdo reduktiĝas je 4 000 juanoj ĉiujare.

Post la finiĝo de la batalo la Dua Kemi-industria Fabriko komencis ĉelokan teknikan kunlaboron kun ĉ. 30 scienc-esploristoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝi uzis novan varmokonservan materialon, ekspluatis novan varmokonservan teknikon de termika duktoreto kaj per tio gajnis la duan scienc-teknikan progresan premion de la ŝtato. Aplikante tiun teknikon al la dukto kun kalibro de 100 000 metroj, la korporacio ĉiujare ŝparas dekmil tunojn da oleo. ■

Konkologo Xin Qitai

Teksto de HUANG ZONGYING*

Fotoj de WANG PINGFU kaj LI BING

KUN la luno frue leviĝanta kaj la suno malrapide subiranta, mi iris rekte al maro. Vidiĝis domoj apud la vojo kaj en la arbaro. Mi eniris vastan korton ĉirkaŭitan de muro tegita per verdaj kaheloj. En ĝi estas la domo de konkologo Xin Qitai (Ŝin Ĉjitaj), prezidanto de la Baishakou-a Instituto pri Bredado de Konkuloj, Rushan-gubernio, Shandong-provinco. Ĝi konsistas el duĉambra laboratorio, salono, kunvenejo por 20-30 personoj kaj dormoĉambroj, kiuj ĉiuj proviziĝas per fenestropordoj kun alumini-alojaj framoj. La domo servas ankaŭ kiel sidejo de la instituto.

La instituto kovras 3 600 kvadratajn metrojn, i.a. ĝia domo 800 kvadratajn metrojn, konsistigante parton de la privata bieno de Xin Qitai. Tie li laboras konsciencie. Ĉiutage li aŭte veturas al la malprofundaĵo, al la bredejoj de salikokoj kaj pektenoj ĉe la interna golfo de Baishakou. Li dediĉas sian energion al scienca bredado de salikokoj kaj pektenoj. La riĉa rikolto ĝojigas ĉiujn familiojn ĉe Rushan-monto.

Rushan-monto kun du pintoj staras ĉe la Flava

Xin Qitai (maldekstre) observas la kreskadon de pektenoj.




Maro, kvazaŭ paro da mamoj. La marakvo, kiel lakto, karesas la strandon. Xin Qitai vivas en la monto. Kiel aliaj vilaĝanoj, antaŭe li ne havis sufiĉe da manĝaĵoj kaj vestoj, nek bonan domon. De 1983 la vilaĝanoj entreprenas la malprofundaĵon laŭkontrakte. De tiam Xin Qitai, kiu havis sperton en bredado dum dudekelkaj jaroj kaj laboris kiel estro de la breda taĉmento de la vilaĝo, aplikis sian talenton kaj entuziasmis por la malprofundaĵo, por bredado de salikokoj kaj konkuloj. La patrino naturo amas nur siajn lojalajn filojn. En 1984 li perlaboris 240 000 juanojn kaj fariĝis riĉulo fama en la ĉirkaŭaĵo.

“Ĉu la instituto estas via?” mi demandis.

“Jes,” mara vento karesis la krispajn harojn de la pli-ol-50-jara konkologo kun milda vizaĝo. “Ĉu malofte vidiĝas kamparano, kiu konstruis tian instituton?”

“Ĉu la bieno estas aĉetita de vi?”

Xin Qitai (staranta) en laboratorio



“Jes.”

“Ĉu ankaŭ la malprofundaĵo estas via?”

“Ne mia, vere! Kelkajn jarojn poste mi ekspluatos la okcidentan malprofundaĵon.” Jes, kie sterniĝas ekspluatebla malprofundaĵo, tie li laboras. Kun la disvolviĝo de entreprenado kaj laŭ la bezono de laboro li aĉetis jam 3 domojn, tamen li ofte estis en kanvasa budo por observi fluson kaj gardi kontraŭ ŝtelisto aŭ en simpla barako. Ekspluatinte unu malprofundaĵon, li eklaboris sur alia por havigi al si plian punkton de scienca eksperimento. Pasis preskaŭ 10 tagoj, post kiam mi atingis la lokon, sed mi ne povis certigi, kie estas lia konstanta laborejo, des malpli, kiam li komencas kaj finas labori ĉiutage. Li direktas sian bredan taĉmenton per telefono. Se bezone, li povas tuj forveturi ĉu tage ĉu nokte.

En 1983 Xin Qitai kaj aliaj 3 familioj laŭ kontrakto prilaboris 1.3 hektarojn da malprofundaĵo kaj profitis el tio pli ol 10 000 juanojn. Ili dividis la profiton inter si kaj estis rigardataj kiel riĉaj. Xin Qitai pensis: “Se iuj riĉiĝos, kion do ili devos fari kun la aliaj? Mi havas sperton en bredado kaj posedas sciencon kaj teknikon, per kiuj mi riĉiĝos la aliajn.” Pasis jam 4-5 jaroj kaj ĉiuj diris, ke la konkologo estas la plej riĉa kaj plej laca, la plej kolerema kaj plej bonkora. Ĉiuj, kiuj estas farintaj ion malbonan al vilaĝanoj, timiĝas antaŭ li. Li helpas ĉiujn vilaĝanojn, inkluzive de tiuj lin iam ofendintaj, sin riĉigi per laboro. Riĉiĝinte, lia familio vivas simplan vivon kiel antaŭe kaj lia edzino ankoraŭ okupiĝas de mateno ĝis vespero pri dommastrumado kaj aliaj laboroj. Ili turnas sian atenton ne sur plezurĝuon, sed sur tion, kiel racie elspezi monon. Kiel la domo de Xin, ankaŭ la domoj de la vilaĝanoj estas provizitaj per modernaj mebloj kaj elektraj aparatoj. Estas nature oportunigi kaj riĉigi sian vivon per sia enspezo. Post kiam li riĉiĝis, oni petas de li diversajn monhelpojn, kio multe lin maltrankviligas. Tamen li memvole finansas la bredadon ĉe Baishakou per centmiloj da juanoj por disvolvi la tiean produktadon. Vidante riĉan rikolton de salikoj kaj pektenoj sur la malprofundaĵo kaj la vilaĝanojn riĉiĝintajn dank’ al aplikado de scienco kaj tekniko, li sentis la vivon interesoplena. Riĉigi la popolon estas la celo de lia vivo kaj ankaŭ la espero de la ŝtato.

“Ĉu vi havas pli grandan kaj pli konkretan planon por la estonteco?” mi demandis.

“Mi volas nur indan vivon,” respondis Xin, kun vizaĝo al la ĉielo kaj la maro. “Mi faras ĉion ĉi nur por trovi solvon. Oni estu lojala al scienco kaj senĝene donu ĝiajn fruktojn al la popolo. Kiom da personoj li povu unuigi? Kiom grandan terpecon li povu riĉigi per sia ekzemplo? Kiom granda estu la influo “Konkologo Xin zorgas pri la ŝtato kaj la

popolo, amas siajn patrolandon kaj hejmlokon kaj persone donas bonan ekzemplon. li, nur li, feliĉigas sian hejmlokon kaj ankaŭ donas al ni ian edifon.

La Baishakou-a Instituto pri Bredado de Konkuloj, Shandong-a Instituto pri Bredado en Marakvo kaj Rushan-a Eksperimentejo pri Bredado de Konkuloj kune faris sciencajn esplorojn, kiaj regado kaj utiligado de nutraĵo ellasita el salikoka bredejo en la internan golfon kaj eksperimentado pri kreskado de pektenidoj en salikoka bredejo, kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Xin Qitai ĝojis, ke la respondeculoj pri sciencaj esploroj, invititaj profesoroj kaj altklasaj inĝenieroj gvidas junulojn en observado de fizikemiaj kaj biologiaj faktoroj en akvo. Venis sezono de rikolto de marproduktaĵoj. Mi vidis, ke Xin Qitai, portante nur kuloton, gvidas bredistojn en dissemadado de pektenidoj kaj rikoltado de salikokoj kaj pektenoj en la frostventa maro. Li, brava viro, per siaj diligentaj manoj riĉigas la vilaĝanojn. ■

* La aŭtoro estas ĉina filmaktoro kaj verkistino.

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugalio	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio


Tolstoj kaj Esperanto

“NEPRA NECESO”

“La facileco de ĝia lernado estas tia, ke, ricevinte antaŭ 6 jaroj gramatikon de Esperanto, vortaron kaj artikolojn, skribitajn en tiu lingvo, mi povis post ne pli ol du horoj da okupiĝo, se ne skribi, do plene libere legi en tiu lingvo.” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 67, p. 101)

Tiuj vortoj de L. Tolstoj estas vaste konataj kaj ofte cititaj de la Esperanta gazetaro.

Portreto de L. Tolstoj



Sed, interrilatoj inter Tolstoj kaj Esperanto ne limiĝas en tio.

Frue en 1889, t.e., en la dua jaro post la naskiĝo de Esperanto, Tolstoj jam havis kontakton kun Esperanto. Tiam V. V. Majnov, rusa verkisto kaj ĵurnalisto, sendis “la Unuan Libron” al Tolstoj kaj petis alian opinion pri Esperanto. La 13-an de septembro, 1889, en sia taglibro Tolstoj notis:

“Mi skribis leteron al Majnov pri la lingvo Esperanto. Bona verko.” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 50, p. 142)

En tiu letero Tolstoj skribis:

“Mi atente tralegis la lernolibron de la Internacia Lingvo, kiun vi sendis al mi, kaj mi trovas, ke tiu lingvo plene kontentigas la bezonojn de internacia eŭropa (Eŭropo kun la kolonioj, inkluzive Amerikon) lingvo... Mi opinias tiun agon — la akcepton de unu lingvo fare de la Eŭropanoj — ago de unuaranga graveco, kaj tial mi estas tre dankema al vi pro la alsendo kaj mi, laŭ miaj fortoj, klopodos disvastigi tiun lingvon; la plej ĉefa estas mia konvinko pri ĝia nepra neceso.” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 64, p. 304)

«LA ESPERANTISTO»: ENIR-MALPERMESO KAJ ĜIA NULIGO

La Esperantisto, unua organo de diverslandaj esperantistoj, naskiĝis en la 1-a de septembro, 1889. En ĝia 2-a numero de 1895 aperis *Prudento kaj Kredo*, Esperanta traduko de artikolo de Tolstoj. Pro tio la revuo estis malpermesita de cara cenzuro en Rusio. Tio estis morta bato por la juna neregistara gazeto, ĉar en Rusio troviĝis plejparto de ĝiaj abonantoj. Al ĝi Tolstoj es-

primis grandan simpation. Li skribis al Strahov je la 5-a de majo, 1895:

“Estas iu doktoro Zamenhof, kiu kreis la Esperantan lingvon kaj publikigadis en ĝi gazeton, ŝajnas en Dresden. La gazeto havis ĉ. 600 abonantojn, el kiuj la plimulto estis en Ruslando. Miaj amikoj, precipe unu, Tregubov, granda apoganto de Esperanto, dezirante subteni la gazeton, publikigis tie unu mian leteron pri la rilato de la racio al la religio, tre senkulpan, kaj ankaŭ unu artikolon pri la nepagado de la impostoj en Nederlando. Tio kaŭzis, ke oni malpermesis enlasi la Esperanto-gazeton en Ruslandon, kaj Zamenhof, pasie dediĉita al sia verko, kaj materie ruiniĝinta jam antaŭe pro tiu verko, suferis parte ankaŭ de mi. Ĉu ne eblas havigi al li denove la permeson por allaso de la gazeto en Ruslandon?” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 68, p. 89)

Ricevinte la leteron de Tolstoj, Strahov turnis sin al poeto Appolon Majkov, prezidanto de la Komitato por Eksterlanda Cenzuro, kaj tiu promesis nuligi la enir-malpermeson.

“MI ESPRIMAS MIAN KONSENTON PRI TRADUKO AL ESPERANTO DE KIU AJN EL MIAJ VERKOJ”

“Mi plene konsentas kun la opinio, esprimita en via letero, pri la granda signifo de la Internacia Lingvo kaj ankaŭ mi mem tre volonte kunlaborus en tiu agado, laŭ miaj fortoj, inter la aliaj agantoj. Mi esprimas mian konsenton pri traduko al Esperanto de kiu ajn el miaj verkoj. Ĉu vi ne opinias konvena fari Esperantan tradukon de mia artikolo pri la paco, ankoraŭ ne publikigita, sed preparita por la Stokholma Tutmonda Kongreso de la Paco?” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 80, p. 65)

Tiuj diroj estis en la letero de Tolstoj al Internacia Socia Revuo je la 17-a de aŭgusto, 1909. En la 1-a numero de 1910 de la revuo aperis la supre dirita artikolo de Tolstoj.

ESPERANTO — LINGVO LERNENDA

Tolstoj plurfoje emfazis la gravecon de lingva lernado. Li opiniis, ke pere de tia lernado la homoj povas ne nur gajni scion kaj vastigi sian vidkampon sed ankaŭ pliigi reciprokan komprenon kaj intimigi siajn interrilatojn. Estas neeble ellerni ĉiujn lingvojn, tial li pledis por lernado de nur kelkaj lingvoj plej necesaj.

Kiuj estas la plej necesaj? En sia letero al P. L. Birjukov je la 10-a de aprilo, 1905 Tolstoj skribis:

“Rilate la lernadon de la lingvoj — ju pli multaj, des pli bone — mi opinias, ke jen, tiujn ĉi, laŭ mi, viaj infanoj devus lerni: la francan kaj germanan nepre, la anglan kaj Esperanton, se eble.” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 73, p. 68)

HONORA MEMBRO DE ESPERANTO-ORGANIZOJ

Pluraj Esperanto-organizoj elektis Tolstoj kiel honoran membron kaj li ĉiam afable dankis kun ĝojo. Duonjaron antaŭ sia morto, li ricevis leteron de V. S. Bodnarski, reprezentanto de la Studenta Ligo “Esperanto” en Moskvo. Li informiĝis, ke li jam fariĝis honora membro de tiu Ligo. Li respondis je la 3-a de februaro, 1910:

“Mi plene konsentas kun la celoj de agado de via Ligo kaj mi dankas pro la honorigo.” (Plena Verkaro de L. Tolstoj, rusa eldono, Vol. 81, p. 86)

IDEALO DE LA ESPERANTISTOJ

En aprilo, 1894, esperantista grupo en Voronej leteris al Tolstoj, petante lian opinion pri Esperanto. La 27-an de aprilo Tolstoj respondis la grupon per longa letero kun eldiroj menciitaj jam en la komenco de tiu ĉi artikolo. En la letero estis kelkaj vidpunktoj pli gravaj, inkluzive de tiuj pri internaciaj komunaj lingvoj kaj precipe pri Esperanto. Li diris, ke enkonduko de la Internacia Lingvo estas progresa paŝo garantianta “la reciprokan interkompreniĝon de la homoj unuaj kun la aliaj”. Li konkludis, ke ĉiuj homoj de ĉiuj nacioj lernu internaciecan facilan lingvon kaj tio “estas ankaŭ idealo de la esperantistoj”. ■

Ekspozicio de libroj

La Internacia Libro-foiro de Bruselo

okazos inter la 10-a kaj 18-a de marto 1990

en la Internacia Centro Roger (Centre International Roger).

Abonanto de EPĈ bonvolu peti enirbileton senpage ĉe la Librejo Granda Muro (Librairie Grande Muraille). Ĝi estas la ununura librejo de Belgio, kiu peras ĉinajn librojn kaj gazetojn. Adr.: 5, Galerie rue de Ruysbroeck, 1000 Bruxells. Tel.: 02/5121456.

ESP-NOVAĴOJ

● De la 6-a ĝis la 10-a de novembro 1989 okazis en Nanning, Ĉinio, la Azia Konferenco de Esperanto-Instruado kune okazigita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Guangxi-a Nacimulplimulta Universitato de Ĉinio. Ĝin partoprenis ĉ. 40 esperantistoj el Japanio, Sud-Koreio, Sovetio, Svedio, Belgio, Usono kaj Ĉinio, inter kiuj estis s-ro Symoens Edward, prezidanto de ILEI, kaj s-ro So Gilsu, estrarano de UEA.

Dum la konferenco, oni faris akademian interŝanĝon, projekciis Esperanto-instruan filmon. S-ro Symoens Edward prezidis Esperanto-ekzamenon kun internacia normo. Post 8-hora ekzameno, 15 sukcesintoj akiris diplomon donitan de UEA kaj ILEI. La konferenco estis utila al la Esperanto-movado de Ĉinio kaj Azio.

● Ekde la 5-a de oktobro 1989, la Qingdao-a TV oficiale elserdis la Esperanto-instruan filmon "Espero". Ĉ. 2 000 homoj aĉetis la lernolibron kaj bildbendon por la lernado. Por elsendo de la filmo "Espero" en Qingdao, la Qingdao-a Esperanto-Asocio kaj la Qingdao-a Kompanio de Poŝtmarkoj kune faris memoran kovrilon kaj stampilon.

● Lastatempe fondiĝis la Huaiyin-a Esperanto-Asocio en Jiangsu-provinco kaj la Liling-a Esperanto-Asocio en Hunan-provinco. Huaiyin estas naskiĝloko de la forpasinta ĉefministro Zhou Enlai kaj Liling — fama ĉina porcelana urbo.

● La 16-an de novembro 1989 forpasis Liu Hongkang, honora membro de la konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, prezidanto de la Sichuan-a Esperanto-Asocio kaj konsilanto de la Financ-ekonomia Universitato de Sudokcidenta Ĉinio en la aĝo de 78 jaroj. Prof. Liu sin okupis pri instruado kaj instrua administrado, studo pri demografio. Li estis fama instruisto kaj demografo. Li aktive instruis kaj pro-

pagandis Esperanton dum dekoj da jaroj, kaj faris gravajn kontribuojn al la Sichuan-a Esperanto-movado.

● Bulgara Esperanto-teatro kun apartaj trajtoj kvankam ne havas fiksan ludejon, nek luksajn rekvizitojn, tamen povas ludi sur ĉia scenejo. La aktoroj ne ricevas salajron de la teatro. Ili estas salajrataj reĝisoroj aŭ aktoroj de aliaj artaj trupoj. Ili prezentas ĉiam en Esperanto.

De post sia fondiĝo en 1958 ĝi turneis tra la mondo por montri la atingojn de la bulgara popolo en la socialisma konstruado, aktive propagandante Esperanton, la komunan trezoron de la homaro. Ĝi prezentis plurajn klasikajn teatraĵojn, inkluzive tiujn de Ŝekspiro kaj Moliere. Intertempe ĝi partoprenis 24 Esperantajn konkursojn en 15 landoj kaj estis laŭdata de la spektatoroj. Erudiciaj esperantistoj laŭdas ĝin pro ĝiaj kontribuoj al la disvolviĝo de Esperanta kulturo kaj artistoj alte taksas ĝiajn sukcesojn.

● La Esperanto-societo Scienc-teknika Ekspluata Korporacio "Verda Stelo" de la Nordoriento de Ĉinio, la Tutlanda Federacio de Laborista Sindikato de Ĉinio kaj la Ĉina Muzikista Asocio kune iniciatis konkurson pri novaj laboristaj kantoj junio de 1989 kaj publikigis la rezulton decembre en la sama jaro. La kantoj "Kame-la Urbo", "Kie Printempo?" k.a. estis premiitaj. La 20 000 juanoj elspezitaj de tiu konkurso estis liveritaj sole de la Esperanto-societo "Verda Stelo". La konkurso estas utila por disvastigi la influon de Esperanto en Ĉinio.

● Inter la 26-a de aŭgusto kaj la 4-a de septembro 1989 en Borgo Maggiore (Respubliko de San Marino) ĉirkaŭ 90 studentoj kaj akademiinstruistoj venis partopreni la Sesan Sanmarinan Universitatan Sesion de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

La partoprenintoj studis en la 6 fakultatoj de AIS, nome kibernetiko, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj kaj morfosciencoj.

Ĉi-jare 4 studentoj akiris bakalaŭran gradon, 7 magistran, 3 doktoran kaj unu originale habilitiĝis en la fako kibernetiko. La venonta Sepa Sanmarina Seso de AIS okazos samloke de la unua ĝis la deka de septembro, 1990.

● La kultura revuo LITERATURA FOIRO en Esperanto fondita de la literatura rondo "La Patrolo" inaŭguris, per la numero 117 (februaro 1989), sian dudekan jarkolekton.

Ĝi nun ampleksas 56 paĝojn kaj eldoniĝas dumonate. Ĝia enhavo, ĉefe beletra, dediĉas grandan atenton al ĉiuj facetoj de la Esperanto-kulturo: teatro, muziko, pedagogio, planlingvistiko, kulturpolitiko, movadologio.


● En la 8-a Internacia Literatura Forumo pri Edmond Privat en Svislando preskaŭ 80 partoprenantoj el 15 landoj aŭskultis kaj debatis la prelegojn de fakuloj pri la temo "la fenomeno Edmond Privat".

● Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto" kunlabore kun la urba societo por sobro ĉiujare organizas la internacian ekspozicion pri la agado por la mediprotektado, sana vivmaniero, kontraŭ alkoholismo, drinkado, tabakfumado kaj droguzado en diversaj landoj. Tiucele ĝi kolektas ĉiulingvajn tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la mediprotektado kaj sana vivmaniero. Bonvolu sendi ĉion (laŭeble baldaŭ) al: International Friendship Club "Esperanto" P.O. Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistan USSR.



S-ro Liu Hongkang

S-ro So Gilsu prelegas en la konferenco.



S-ro Symoens Edward en la konferenco

Zamenhofa festo en Pekino

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de WU XINHUA

1989 estis la 130-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof, kultura eminentulo kaj kreinto de Esperanto. Antaŭtagmeze de la 15-a de decembro ĝin festis pli ol 400 personoj el la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, Ĉina Komitato de Unesko, Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), Pekina Esperanto-Asocio, Radio Pekino, Sciencista-Teknikista Esperanto-

Asocio (STEA) sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS), Redakcio de El Popola Ĉinio kaj aliaj 9 organizoj.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ Lu Jiayi (Lu Ĝjaŝji), vicprezidanto de la Tutlanta Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj honora prezidanto de STEA sub ĈAS; Ma Bin, vicdirektoro de la Ekonomia Centro de la

Ŝtata Konsilantaro kaj honora konsiliano de la Pekina Esperanto-Asocio; Chen Haosu, vicministro de la Ministerio de Radio, Filmo kaj Televido; Ĵelezo, honora prezidanto de ĈEL kaj honora membro de UEA; Chun-Chan Yeh, vicprezidanto de ĈEL, honora membro de UEA kaj fama ĉina verkisto; s-ro William Auld, fama brita esperantisto kaj poeto, kaj lia edzino; pro-

La kunvenejo



S-ro W. Auld kaj ĉinaj esperantistoj



Intima interparolo

Foto de ZHAO BINGYUAN



fesoro Tabor, usona esperantisto; kaj s-ino Jefremova, sovetunia esperantistino.

La kunvenon prezidis Chai Zemin, vicprezidanto de la Ĉina Popola Instituto de Eksteraj Aferoj kaj honora konsiliano de la Pekina Esperanto-Asocio.

S-ro Chun-Chan Yeh faris paroladon kun la temo "Esperanto — espero de paco kaj progreso". Li konigis la vivon de d-ro Zamenhof kaj la procezon de lia kreo de Esperanto, laŭdante grandan kontribuon de Esperanto por la homaro. Li diris, ke la internacia helpa lingvo lumigis lampon por la homaro sur la vojo al paco kaj progreso.

Zhang Chongli (Ĝang Ĉongli), vicĉefsekretario de la Ĉina Komitato de Unesko, diris en la kunveno: "Jam de la komenco Unesko tre atentis la specifan rolon de Esperanto en akcelo de la kultura interŝanĝo kaj kontakto de ĉiuj popoloj, opiniante, ke tia rolo estas identa kun la celo de Unesko akceli la internacian komprenon inter ĉiuj landoj kaj ĉiuj nacioj pere de edukado, scienca kaj kultura kunlaboroj por la mondopaco kaj komuna utilo de la homaro."

S-ro Chen Haosu diris: "En la 20-a jarcento la homaro prenis Esperanton kiel amikon, torĉon kaj riĉaĵon kaj per ĝi venkis diversajn malfacilojn, militajn katastrofojn kaj malhelpojn kaj iras al la hodiaŭo kaj morgaŭo de la monda civilizacio kaj progreso."

La kunvenon salutis ankaŭ s-ro William Auld kaj s-ino Jefremova.

Estas menciinde, ke studentoj de la Esperanto-kurso de la Pekina Disaŭdiga Instituto donis salutvortojn. Kvankam ili lernis Esperanton nur du monatojn, tamen ili povas fari simplan konversacion.

En la kunveno oni voĉlegis skribitajn vortojn de Chu Tunan, prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", kaj marŝalo Nie Rongzhen (Nje Ĵongĝen). Ĉi tiu skribis: "Lernu Esperanton por pliigi amikecon inter la popoloj kaj akceli la mondopacon."

En la sama tago simila festado okazis ankaŭ en la provincoj Shandong, Zhejiang (Ĝeĝjang) kaj la urbo Nankino. ■



Festado de la 25-jariĝo de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

ZHANG QINGZHEN:

25-jara jubileo de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

L 19-AN de decembro 1989 oni solene celebris la 25-an datrevenon de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino en ĝia domo.

La celebradon ĉeestis Ĵelezo, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), Chen Yuan, prezidanto de la Ŝtata Lingva Komitato kaj prezidanto de ĈEL, Chun-Chan Yeh, fama ĉina verkisto kaj tradukisto kaj vicprezidanto de ĈEL, Zhang Qicheng (Ĝang Ĉiĉeng), vicprezidanto de ĈEL, kaj pli ol cent pekinaj esperantistoj.

Chen Yuan donis salutvortojn, gratulante, ke la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino akiris pli kaj pli grandan sukceson.

Zhang Zhenhua (Ĝang Ĝenhŭa), vicestro de Radio Pekino, konigis al la ĉeestantoj la laboron de Radio Pekino en la pasintaj 25 jaroj.

En la komenco Radio Pekino elsendis al Eŭropo Esperantajn programerojn nur dufoje ĉiusemajne. En 1965 ĝi aldonis elsendon al nordorienta kaj sudorienta Azio. Ekde oktobro 1979 ĝi elsendas ĉiutage. En 1980 ĝi aldonis elsendon al Latinameriko. Nun ĝi elsendas 4-foje ĉiutage. Esperantaj programeroj de Ra-

dio Pekino atingas plej multajn lokojn kaj ĝia elsenda tempo estas malpli longa nur ol Radio Polonia.

Radio Pekino elsendas, krom novaĵoj kaj raportaĵoj, ankaŭ ok programerojn, kiel "Ĉina Kulturo", "Vojaĝo en Ĉinio" kaj "Esperanto en Marŝo", por konigi la ĉinajn kulturon, literaturon, arton, historion, geografion, vidindajn lokojn, historiajn restaĵojn, naciajn morojn kaj popolan vivon.

Multaj aŭskultantoj rigardas Esperantan elsendon de Radio Pekino kiel fenestron por koni Ĉinion kaj utilan instrumenton por diskonigi Esperanton. Iuj el ili ne nur serioze aŭskultis Esperantan disaŭdigon, sed ankaŭ surbendigis iujn programerojn por aliaj. Aliaj fervore diskonigas Esperantan elsendon de Radio Pekino per afiŝo, ekspozicio kaj artikolo.

Ankaŭ UEA kaj Esperantaj organizoj de diversaj landoj tre atentis Esperantan disaŭdigon de Radio Pekino. Ili opinias, ke Radio Pekino fariĝis ponto inter esperantistoj de diversaj lokoj en la mondo.

La celebrado finiĝis per kanto de 14 lernantoj de la Esperanta kurso de la Pekina Disaŭdiga Instituto. ■

Teatra lernejo funkciigata de kamparanoj

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

ANTAŬE mi aŭdis, ke la kamparanoj de Zhaochuan- (Ĝaŭĉŭan)-vilaĝo de Xuanhua (Ŝjŭanhŭa)-gubernio, Hebei-provinco, funkciigas teatran lernejon per mem kolektita mono. Ĝi prezentis 36 Shanxi(Ŝanŝji)-ajn operojn bonvenajn al la tiaj kamparanoj, kiaj "Bati Princinon" kaj "Fratinoj Imperiestredzinoj". Mi venis al Zhaochuan-vilaĝo por intervjui. Mia alveno koincidis kun ilia prezentado de la nova opero "Formacio Tianmen". Sur simpla scenejo 16-17-jaraj geknaboj rolis kiel heroinoj. Ili montris sian talenton en kantado, aktorado, recitado kaj luktado, kio vekis aplaŭdadon ĉe la spektantoj.

Veterana artisto en direktado



Post la kuliso mi renkontis Li Zhangao (Li Ĝangaŭ), estron de la vilaĝo kaj lernejo. Li estas talenta kamparano-artisto kaj lertas kanti kaj ludi blov- kaj kordinstrumentojn. Li konigis, ke Zhaochuan-vilaĝo havas la belan nomon vilaĝo de la Shanxi-a opero, kiu aperis tie antaŭ 200 jaroj. La vilaĝanoj plejparte povas kanteti el Shanxi-a opero, citi per unu spiro nomojn de tiaj operoj kaj rakonti iliajn enhaŭvojn.

En la lastaj jaroj, kun la disvolviĝo de la kampara ekonomio, pli kaj pli boniĝis la vivo de la vilaĝanoj. Ili ne kontentigis pri la materia vivo, sed esperis fari la vivon signifoplena. Sekve, en ili kreskis forta deziro ĝui operon. Por kon-

tentigi ilian deziron, respondeculoj de la vilaĝo multfoje petis fakajn teatrajn trupojn prezenti en ĝi. Pro malbonaj kondiĉoj de la vilaĝo, iuj fakaj teatraj trupoj ne volis alveni al ĝi. Komence de 1985, konsilginte kun aliaj, vilaĝestro Li gvidis kamparanojn en memkolektado de mono, konstruado de lernejdomo, trejnejo kaj scenejo kaj aĉetado de kostumoj, rekvizitoj, lumigiloj kaj son-ekipaĵoj. Ili ekfunkciigis la Zhaochuan-an Kamparanan Teatran Lernejon, akceptis 83 lernantojn kaj engaĝis pli ol 10 instruistojn el fakaj teatraj trupoj. Ĝis nun la lernejo jam elkulturis aron da artistoj.

Nun, en la spaco de pli ol 200 km ĉiuj konas la kamparanan teatran lernejon. En ĉiu festotago la ĉirkaŭaj vilaĝoj invitis ĝiajn lernantojn fari prezentadon. Ĉiujare, ili faris prezentadon por vilaĝanoj pli-ol-200-foje. Ili ankaŭ turneis en Wanquan(Ŭanĉjŭan)- kaj Chicheng(Ĉičeng)-gubernioj de Hebei-provinco kaj Duolun-gubernio de la Interna Mongolio. En la lasta oktobro la Shanxi-a opero "Plendo de Jin Yu", prezentita de ili en la Dua Arta Festivalo de Hebei, gajnis trian premion.

En la lastaj jaroj la teatra lernejo ne nur riĉigis per prezentado la kulture vivon de la popoloj de Zhaochuan kaj aliaj vilaĝoj, sed ankaŭ plifamigis la vilaĝon, kio ludis pozitivan rolon en ĝia ekonomia konstruado.

Post la kuliso mi intervjuis an-



Prezentado

kaŭ 19-jaran aktorinon Li Jingjing. Laŭ ŝia aspekto mi neniel povis kredi, ke ŝi devenis de kamparana familio en fora vilaĝo. Aŭdinte mian demandon, ŝi serene respondis: “Mi naskiĝis en kamparo, ta-

men mi ŝatas kanti kaj danci jam de la infaneco. Informiĝinte pri la fondiĝo de la lernejo, mi la unua anoncis min por lerni. Prezenti sur scenejo de longe estis mia deziro.” Ŝi daŭrigis: “Mi tre amas nian ler-

nejon. Precipe kiam mi aŭdis aplaŭdadon dum mia prezentado, mi sentis min fiera. Kvankam la lernejo estas funkciigata de la vilaĝo, tamen, post plurjara prezentado la spektantoj des pli komprenas

Matena ekzercado






Antaŭ prezentado



nin. Tio profundigas nian amon al la lernejo.”

Sub la scenejo mi parolis kun kamparano-spektantoj. Iu maljuna kamparano, montrante la dikfingron, diris al mi: “Estas inda nia pago por la lernejo!” ■



Provprezentado

Li Jingjing ludanta la rolon de Mu Guiying en la formacio Tianmen

Manĝu por sano

de **BORIS KOLKER** (Sovetio)

Sube estas recenzo de la fama sovetia esperantisto Boris Kolker pri "Kuracaj Manĝaĵoj" eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi aperis en la dua numero de "Hungara Vivo", 1989. Estas bonvenaj recenzoj pri libroj eldonitaj de la nomita eldonejo.

La Red.

Eble, vi estos mirigita, kara leganto, se vi aŭdos de mi, ke la kulinario kaj Esperanto estas interesigitaj unu pri la alia. Per kiu lingvo la kuirarto de iu popolo povas fariĝi konata samtempe en multegaj landoj? Nature, per Esperanto. Per kiaspeca esperantlingva libro oni povas pleje interesi homojn pri Esperanto? Evidente, per bele eldonita libro pri alilandaj manĝaĵoj.


La prezentata libro estas tiom pli interesa, ke ĝi baziĝas sur la principo: "Ĉinaj antikvaj medicinistoj opiniis, ke la medikamentoj kaj manĝaĵoj havas la saman fonton, kaj oni devas preni manĝaĵojn kiel helpajn kuracilojn." Agrabla kuracmaniero, ĉu ne?

La redaktoro emfazas, ke la priskribitaj manĝaĵoj kun ingrediencoj "facile akireblaj kaj preparadoj simplaj tre taŭgas al malgrandkvanta preparado hejme." Hm! Kredeble, tio koncernas Ĉinion kaj apudajn landojn. Por aliaj kelkaj nomoj de kuiradoj memorigas pri ekzotikaj orientaj fabeloj: suko de sukerkano kaj lotusradiko, supo el purpura marherbo kaj malgrasa porkoviando, kaĉo el ni-

gra sezamsemo, kokovo kun sojfaba lakto, konfitita laminario, frikasita testudaĵo, fritajo el bambuidaj strioj, herba karmo kun vaksukurbo.

Tuj manĝaĵoj estas preparataj el por ne-ĉinoj pli kutimaj ingrediencoj, kio ne faras ilin malpli nekutimaj: suko de ajlo kaj akvomelono, ĵeleo el lardo kaj mielo, kukuma kompoto, stufitaj ternuksoj kaj porkaj piedoj, kokido kun strioj de mandarina ŝelo, frititaj fiŝvezikoj. Estas priskribitaj ankaŭ malpli ekzotikaj manĝaĵoj.

La unika eco de la libro estas indiko pri malsanoj, kiujn kuracas la respektiva manĝaĵo. Ekzemple, trinkaĵo el bruna teo, mielo kaj sukero kuracas stomakan kaj duodenan ulceron; terpoma suko helpas ĉe kronika kolecistito; supo el porka haŭto kaj jujuboj kuracas malmultiĝon de



KURACAJ MANĜAĴOJ

Kompilis Ŝeng Uejĝjan k. a.



ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

trombocitoj kaj gingivan sangadon; ĵeleo el morusberoj kaj mielo kuracas neŭrastenion, sendormecon, fruan blankiĝon de haroj ktp. Kiu povus imagi, ke karota kaĉo kuracas senapetitecon, noktan blindecon, hipertension kaj diabeton; ke la simpla maizfaruna kaĉo kuracas koronarian kormalsanon kaj arteriosklerozon kaj preventas kancerajn!

La libro entenas tri utilajn apendicojn. La laboro de la tradukisto meritas la plej altan laŭdon. ■

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj(m)	KHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.6	9480
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

Pri “Bambuo sur Roko”

de DI ZI

*Vi kroĉas forte vin al monto verda,
Kun la radikoj en la roko fenda,
Spitante al mil, dekmil la turmentoj
De norda, sud' aŭ vento okcidenta.*

Ĝi estas porpentraĵa poemo de Zheng Xie (Ĝeng Ŝje), pentristo kaj kaligrafo de Qing-dinastio (1644-1911). Zheng Xie, alinome Zheng Banqiao (Ĝeng Banĉjaŭ), naskiĝis en Xinghua (Ŝinghŭa) de Jiangsu-provinco. Li sukcese trapasis la kortegan ekzamenon en 1736 kaj funkciis kiel guberniestro en Shandong-provinco. En sia 12-jara ofitado li multe zorgis pri la vivo de la loĝantoj. Li laboris honeste. Foje, li ofendis altrangan oficiston per tio, ke li petis malpezigi ŝuldon al katastrofosuferantoj. Poste, pretekstante malsanon, li rezignis la oficon kaj revenis al Yangzhou (Jangĝoŭ). Tie li vivtenis sin per vendo de pentraĵoj.

Umearbo, orkideo, bambuo kaj krizantemo estas simboloj de nobleco en la okuloj de la ĉinaj literatoroj kaj temoj ofte pritraktataj de ili. Zheng Xie lertis pentri orkideon kaj bambuon. La bambuoj, kiujn li pentris, ĝuas grandan famon pro sia pompeco kaj originaleco. Liaj kaligrafaĵoj estas plejparte liberstilaj, kombinante oficialan kaj regulan skribsistemojn.


“Porpentraĵa poemo” estas poemo, kiun la pentristo mem aŭ iu alia skribas sur la malplena loko de la pentraĵo por esprimi sian senton aŭ opinion pri arto. En sia poemo Zheng Banqiao prikantas la bambuon, kiu pompas en vento kaj enradikiĝas profunde en fendhava roko, kio montras la noblan karakteron de la aŭtoro.


La bambuoj, pentritaj de Li Han laŭ la imaga efekto de la poemo, sin karakterizas per seriozeco kaj senĝeneco kaj prezentas la stilon de lia kaligrafio. Per ekstra plano pri la frondaro li sukcese konigas la karakteron de bambuo.

Chen Xiwei faris kaligrafaĵon por la poemo. La verko en oficiala skribsistemo impresas aplombe kaj senĝene. El ĝiaj malpeza strukturo kaj libera

tuĉado montriĝas lia mirinda lerteco en belskribo. Ĝenerale, kiam oni faras kaligrafaĵon en oficiala skribsistemo, oni intensigas tuĉadon per peniko por doni al ĝi pezan efekton. Tamen Chen Xiwei montras sian bonhumoron ĉe skribado per malpeza tuĉado. Tio estas malofte videbla. ■

Kaligrafaĵo de Chen Xiwei





板橋老人詩意

己秋
東子漢芬記




Pentrajo farita de Li Han por la poemo



● Nun sur la Tibeta Altebenaĵo oni rapidigis la plenumon de aro da konstruaĵoj, al kiuj la ŝtato investis 1.3 miliardojn da juanoj. Inter ili estas pligrandigo de la Gonggara Flughaveno de Lasao, konstruo de la elektra stacio ĉe la lago Yamzho Yumco, kiu laboros per pumpe altigita akvo, rekonstruo de la Ĉina-Nepala Ŝoseo, rekonstruo de la malnovaj kvartaloj de Lasao kaj riparo de Potala-palaco.

● Ĉinio havas grandan rezervon de stano, kiu okupas la unuan lokon de la mondo. Ĝi produktigas ĉefe en la provincoj Yunnan, Guangxi kaj Guangdong. Geĵiu de Yunnan kaj Dachang de Guangxi estas la plej famaj stanaj produktaĵoj de Ĉinio. Ĉinio havas ankaŭ riĉan rezervon de titano, kiu estas vaste uzata en la altteknikaj kampoj, kiel kosmonaŭtiko

Potala-palaco en riparado



kaj nukle-energia elektra stacio. Ĉinio produktas mil tunojn da titano jare, starante en la unua vico de titan-produktaj landoj.

● La 252.5-kilometra kanalo por konduki akvon de la Flava Rivero al Qingdao jam estis finkonstruita en novembro de la pasinta jaro. Nun la Flava Rivero liveras ĉiutage 300q000 kubmetrojn da akvo al la urbo.

● Antaŭ nelonge la Pekina Popola Maŝinfabrika venkis ĉiujn 20 famajn fabrikojn de federacia Germanio, Japanio, Italio, Usono, Francio kaj Britio per siaj kvin specoj, sume 113 ofsetaj presmaŝinoj en adjudiko okazigita de internacia adjudika kompanio.

● En la dua duonjaro de 1989 ĉinaj specialistoj faris kompletan ekzamenon al la Nankina Pontego super Yangzi-rivero. La rezultoj montras, ke la ponto restas bonkvalita kaj en la strukturo kaj en la funkcio. 21 jarojn post la lanĉo en decembro 1968, ĝin trapasis vagonaroj milion-foje, aŭtoj dekmilion-foje, kun varoj de pli ol 2 miliardoj da tunoj. La ponto donas al la ŝtato grandan profiton.

E La plia longa ŝosea ponto, la Kaifeng-a Ŝosea Pontego super la Flava Rivero en Henan-provinco, estis lanĉita antaŭ nelonge. La ponto longas 4 475 m, kun 108 spanoj. La planko de la ponto larĝas 18.5 m, kun 12.3 m destinitaj por aŭtoj, kaj 6.2 m por homfortaj veturiloj kaj piedirantoj.

● Post 11-jara pena esplorado la Ŝanhaja Bioĥemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcesis ŝanĝi genetikan karakteron de planto per bioingeneria tekniko kaj kreis novajn speciojn de kotono kaj rizo, kiuj estas sufiĉe altvaloraj ekonomie.

● Malgranda superkomputilo, kies volumeno estas duono de su-


perkomputilo kaj kosto — dekono de la lasta, estis elfarita en Pekino. Ĝi estas granda kiel 51-centimetra kolora televidilo kaj povas fari flos-punktan operacion dek milionojn da fojoj sekunde.

● Kiel la fenestro de la ĉina ekstera komerco, la Ĉina Internacia Ekspozicia Centro estas la plej okupata de post sia ekfunkcio en 1985, ĉi tie oni ekspozicias diversajn varojn, kiaj lignoprilaboraj maŝinoj, ilmaŝinoj, energiaj ekipaĵoj, maŝinoj, elektronikaj aparatoj, teksaĵoj, metalurgiaj produktaĵoj, aŭtoj, fotografiaj aparatoj, sportaj ekipaĵoj, medicinaj ekipaĵoj, instruaj aparatoj kaj libroj. La ekspozicio donas ŝancon al la vizitantoj koni produktaĵojn de diversaj landoj.

● En la 38-a Eureka Monda Inventa Foiro la ĉina delegacio gajnis medalojn 15 orajn, 11 arĝentajn, 10 kuprajn, kaj krome 10 honorajn atestojn. Ĉinio gajnis la plej multajn medalojn en la foiro.

● Antaŭ nelonge la brandfabriko Wuliangye lanĉis sur la merkato "Azia Viskio". La brando estas farita el bonkvalitaj grenoj kaj aliaj plantoj. Ĝi estas 42-grada alkoholaĵo kun tipa gusto de viskio kaj originala gusto de ĉina tradicia brando.

● Oficiale lanĉita estis la ofidomaro de la Ĉina Internacia Komercita Centro. Ĝi konsistas el oficeja domo, pensio, la Granda Ĉina Hotelo, la Internacia Komercita Hotelo kaj la Ekspozicia Centro. Nun 60 procentoj de la konstruaĵoj jam estas luitaj de pli ol cent translandaj kompanioj de Usono, Japanio, Francio, Italio k.a. Ĝi estas la dua granda komerca centro en la mondo kaj la plej granda moderna konstruaĵaro de Ĉinio nuntempe. Ĝiaj investaĵoj atingis 400 milionojn da usonaj dolaroj.



En salono de la Ĉina Internacia Ekspozita Centro

La modelo de la Ĉina Internacia Komercita Centro

● La Ŝanhaja Tria Bicikla Fabriko jam eksportis sume miliardon da bicikloj kun fama marko "Fenikso", kiuj ĉefe vendiĝas en la triamondaj landoj kaj iam troviĝis sur la merkato de Italio kaj Usono.

● En la Tria Monda Virina Halterleva Ĉampioneca Konkurso la ĉinaj sportistinoj gajnis ĉiujn naŭ orajn medalojn de tri kategorioj, rompinte sep mondajn rekordojn kaj atinginte unu mondan rekordon.

● Antarkto origine estis mildklimata verda mondo, kie prospere kreskis vegetaĵoj. Tion raportis la estro de la Nankina Geologia Paleontologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. La raporto asertas, ke la geologia historio de Antarkto komenciĝis antaŭ pli ol 80 milionoj da jaroj, sed ne antaŭ 40-50 milionoj da jaroj, kiel oni antaŭe opiniis.

● Antaŭ nelonge ekkonstruiĝis juvela urbo, kiu okupos 20 000 kvadratajn metrojn kaj havos 3 000 administrantojn kaj laboristojn. La urbo situas en Fuzhou, Fuĵiang-provinco. Post sia finkonstruo ĝi produktos per modernaj teknikoj purajn kaj diverskara-

tajn oraĵojn, inkrustajn, perlajn, diamantajn, smeraldajn kaj aliajn gemajn juvelojn, sume en valoro de 700 milionoj da juanoj ĉiujare.

● La plej granda bronza budho en la mondo estis inaŭgurita en Hongkongo lastatempe. La postamento estis farita imite al la bazo de la Ĉiela Aĵaro de Pekino, kaj la budho altas kiel naŭetaĝa domo. La surfaco de la statuo estas 1 400 kvadrataj metroj. Sur la manplato de la budho povas stari dek homoj. Ĝi estis farita de la Ĉina Navigacia kaj Kosmonaŭtika Industria Ministerio.

● Pasintjare, ĉinaj petrolprospektoroj trovis en profundo de la dezerto Taklimakan, situanta en nordokcidento de Ĉinio, izolitan vilaĝon de 200 uĝuroj. Ili loĝas en domoj el poplaj trunkoj kaj sin vivtenas per sovaĝaj vegetaloj kaj fruktoj, kortobirdoj, breditaj bestoj kaj ĉasaĵoj. Ili scias nek ekziston de Qing-dinastio (1644-1911) en la historio, nek la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko antaŭ 40 jaroj.

● Nun en Ĉinio estas 8 000 filatelistaj asocioj kaj organizoj kun 500 000 registritaj membroj, kaj ĉ. 6 milionoj da homoj kolektas poŝtmarkojn.

● La sovaĝa ĉevalo estas rara granda hufulo en la dezerto Gobio de Azio. Ĝi malaperis antaŭ dekelke da jaroj. Por savi la specion el perejo, la specialistoj de Xinĵiang-a Uĝura Aŭtonoma Regiono post kvin-jara peno sukcesis resovaĝigi 13 bredatajn sovaĝajn ĉevalojn. Tiu greĝo da bestoj jam naskis 12 idojn. Ili multe plifortikiĝis kaj resovaĝiĝis.

● La Komunista Partio de Ĉinio daŭrigas en la partio la laboron por likvidi putrajn fenomenojn kaj malobservon de la partiaj disciplinoj kaj reregistri kaj ekzameni partianojn. De januaro ĝis septembro 1989 ĝi ekigis 12 500 partianojn kaj punis dek oficistojn en rango de vic-provincestro.

● 600 lignaj arhatoj estis transportitaj al Nov-Jorko. Ili estis faritaj de la Ningbo-a Artmetia Fabriko de Zhejiang-provinco. La ortegitaj arhatoj altas 60 cm kaj pezas 20 kg. Ili aspektas en tre diversaj pozoj.

E En aŭgusto, pasintjare, kampano de Fusong-gubernio, profunde situanta en Changbaimontaro, trovis raran sovaĝan ginsengon de pli ol 50 jaroj. La valorega ginsengo pezas 305 g kaj altas 95 cm.

Por la 11-a Azia Sportkunveno

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LI SHIXIN kaj LI CHUNGENG

APUD la ŝoseo kondukanta al la Ĉefurba Flughaveno de Pekino staras granda okuĉfrapa slogantabulo kun vortoj “Bonvenon al la 11-a Azia Sportkunveno”, sub kiu elektronika ekrano ĉiutage atentigas al la

pasantoj per novaj ciferoj: La azia sportkunveno pli kaj pli proksimiĝas al ni.

La 11-a Azia Sportkunveno estos okazigita en Pekino de la 22-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro 1990. Kiel gastiganto la urbo Pek-


ino liveris al ĝi grandajn kvantojn da laborfortoj, materialoj kaj mono. En Pekino aperas granda fervoro pri la Azia Sportkunveno: ĉie pendas diversaj slogantabuloj “La Azia Sportkunveno proksimiĝas”, “la Azia Sportkunveno post xxx tagoj”, “Sekuran Trafikon kaj

La sportista vilaĝo en konstruado





Afablan Servadon por la Azia Sportkunveno". Sur ĉefaj stratoj kuras reklamaj aŭtoj por propagandi la sportkunvenon. Kun proksimiĝo de la sportkunveno, la preparaj laboroj estas streĉe farataj.




Parto de la surakva konkursejo



La sporthalo Muxiyuan

Chaoyang-sporthalo



KONSTRUOJ DE LA AZIA SPORTKUNVENO

Pekinanoj iam maltrankviliĝis pri prokrastiĝo de la konstruado, sed hodiaŭ ili estas fidoplenaj. Zhang Baifa, vicurbestro de Pekino, junulara sturma brigadestro en konstruado de la Popola Halo, Ĉina Belarta Domo kaj aliaj 8 gigantaj konstruoj, anoncis al la gazetistaro: La Azia Sportkunveno bezonos 31 konkursejojn kaj 46 trejnejojn, inter kiuj 27 estos altnormaj konkursejoj, 16 nove konstruitaj kaj 11 rekonstruitaj. Krome, estos sportista vilaĝo kaj koncernaj instalaĵoj de urba trafiko, komuniko, novaĵ-propagando, brodkasto kaj televido, kulturo kaj amuzo, medicino kaj higieno. Ilia totala konstrua areo estas miliono da kvadrataj metroj. Ĉiuj tiuj konstruoj estis transdonitaj al uzado februare de 1990, escepte de la naĝdomo.

La vizito de la konkursejoj profunde min impresis. Kun diversaj stiloj, originalaj formoj, avangardaj instalaĵoj kaj perfekta funkcio

ili racie dislokiĝas en la antaŭurbo de Pekino. Ili ludos sian rolon en la tempo de la 11-a Azia Sportkunveno. La rekonstruita Pekina Laborista Stadiono povas enteni 70 000 spektantojn. Ĝi funkcios kiel loko por la inaŭguro kaj ferma ceremonio de la sportkunveno kaj ĝia ludkampo de la finalo de la piedpilka konkurso. La nove konstruita Studenta Sporthalo estas korbopilka konkursejo kun 4 000 sidlokoj, kies plejparto estas movebla. La okangula Yuetan-a Sporthalo funkcios kiel ĵuda konkursejo de la sportkunveno. La ovala Chaoyang-a Sporthalo kun ŝtal-kable tirata tegmento estos uzata por flugpilka konkurso de la sportkunveno. En la norda antaŭurbo de Pekino konstruiĝis la Norda Sporta Centro, konsistanta el atletika konkursejo, naĝdomo, sporthalo kaj hokea konkursejo. Tie oni okazigos nombron da konkursoj. La impona Norda Naĝdomo estos moderna konstruaĵo, plej granda en Azio, kie oni povos okazigi grandan internacian naĝan konkurson. La projektintoj instalas dikajn kablojn por oblikve tiri la teg-

menton pezan je pli ol 280 tunoj kaj longan je 117 metroj. Kiam oni tegmentis la naĝdomon en la varmaj tagoj de la pasinta somero, junaj laboristoj kreis sciencan metodon post pruvado, t.e. ili instalas kolorajn vitroplastajn platojn sur senjunta tegmento.

La sportista vilaĝo de la Azia Sportkunveno estas kunligata per subtera vojo kun la centro, kiu situas je 2 kilometroj for de ĝi. La loko distancas de Tian'anmen-placo je 9 kilometroj. Antaŭe tie estis kulturita tero, sed nun altaj etaĝdomoj unuj apud aliaj. Ĝi estas destinita por la 11-a Azia Sportkunveno kaj ankaŭ servos al grandaj internaciaj konferencoj, ekspozicioj, turistoj kaj komercistoj rezidantaj en Pekino kiel oficejoj. Tie loĝos pli ol 6 000 sportistoj kaj trejnistoj. Tie troviĝos sidejo de la organiza komitato kaj novaĵ-centro de la sportkunveno.

La vilaĝo konsistas el konferenca domo, hotelo, apartamenta hotelo, aĉet-centro, drinkejo, lernejo, infanĝardeno kaj aliaj konstruaĵoj,

Konstruado por la sportkunveno



kiuj kun plankareo de 500 000 kvadrataj metroj entute kovras areon de 31.5 hektaroj. Ĝia ĉefa konstruaĵo estas Kunven-domo kun originalaj trajtoj el granda, mezgrandaj kaj malgrandaj haloj. Ĝi estas instalita per aŭdvidaj aparatoj kun simultana interpreta sistemo de ok lingvoj, komputila regsis-temo, modernaj oficejaj instalaĵoj, avangardaj komunikaj instalaĵoj: internaciaj kaj enlandaj rektaj telefonoj, telegrafo, telekso, telefotografio k. a. Tie estas ankaŭ elegantaj komfortaj ripozhalo, drinkejo, krakmangejo kaj aŭtoparko.



Akcepto de vizitantoj de la sportista vilaĝo

STREĈA TREJNADO

En la 11-a Azia Sportkunveno estos 27 konkursoj el 308 disciplinoj. 308 oraj medaloj atendas la konkursantojn. Sed en la lasta Azia Sportkunveno la nombro de oraj medaloj estis 269.

La ĉina delegacio el 600 sportistoj partoprenos en la 27 konkursoj. Ĝi celos akiri la unuan lokon de oraj medaloj, la totala nombro de

la medaloj kaj spirita civilizacio.

Evidente, por la ĉinaj sportistoj tio estas malfacila tasko. Iuj el ĉinaj sportistaj rondoj maltrankvilas, ke ili, tiel peze ŝarĝate, eble ne povos atingi sian plej bonan nivelon. Por ne vanigi la nacian esperon, nun 1 478 ĉinaj sportistoj estas en streĉa trejnado. Iuj el ili sin

ekzercas en la ŝtataj teamoj, dum aliaj aliloke.

La sportistoj kun alta entuziasmo estas rigore trejnitaj. La teamoj de biciklistoj, plonĝistoj kaj naĝistoj havas ĉiu ian progreson. Iuj eminentaj sportistoj denove atingis sian nivelon antaŭ la 24-aj Olimpikoj. La monda ĉampionino de plonĝado Gao Min diris: "En la streĉa trejnado ni devas disvolvi peneman spiriton por akiri la oran medalon de sporta konkurso kaj tiun de la spirita civilizacio en la Azia Sportkunveno." La ĉina teamo de teniso kaj tiu de bazpilkado estis kompare malfortaj sed nun iagrade altiĝis ilia nivelo dank' al trejnado. Ĉinio denove havis bokson antaŭ du jaroj. La boksa teamo estas kvankam juna, tamen progresas rapide. Nun ĝi plifortigas sian trejnadon.

Studentoj laboras volonte por la sportkunveno.



POR PLI BONA SERVO

"Sen bonkvalita servo la preparaj laboroj estos nekontentigaj, malgraŭ ke ĉiuj laboroj estos tute plenumitaj," diris Kang Fengyun, respondeculo de la trejna centro de la sportista vilaĝo.

Por montri etiketojn kaj gastaman tradicion de la ĉinoj kaj sentigi al la gastoj hejman komforton, oni devos fari brilan administra-



En la sporthalo Shijingshan



Servistinoj trejnataj

Foto de **SONG LIANFENG**

En la komputila centro de la sportkunveno



don kaj perfektan servon. La trejna centro celas realigi la dezi-
ron.

Pli ol 200 administrantoj kaj teknikistoj el la ĉ. mil laborantoj de la vilaĝo estis diversmaniere trejnitaj. Kang Fengyun diris: "Iuj plue lernas en fremdlingvaj institutoj kaj aliaj en grandaj hoteloj de malfermitaj urboj." Ĝenerale dirite, la laborantoj devas posedi fremdan lingvon por bone plenumi sian laboron. ■

KORPOSANIGAJ METODOJ (XII)

Protektado de la nerva sistemo kaj la membroj

PARALIZO

1. Staru senmove per unu piedo surtere kaj etendu la alian flanken de la korpo (Bildo 1). Turnu la etenditan piedon antaŭen kaj malantaŭen kaj samtempe rapide turnu la manojn. Faru tion po 14 fojojn alterne per la piedoj dekstra kaj maldekstra. Tio povas forigi malvarmon en la dorso kaŭzitan de vento, hemiplecion kaj malglatan cirkuladon de vitala energio kaj sango.

2. Tenu la brakojn antaŭ la brusto, kvazaŭ ion ĉirkaŭprenante. Enspiru, retenu la spiron laŭeble kaj elspiru, kiam vi ne povas ĝin reteni. Faru tion 9 sinsekvajn fojojn. Tio povas forigi lacon kaj doloron en la membroj kaj kuraci reŭmatismen kaj hemiplecion.

REŬMATISMO

1. Kuŝu surdorse kun la membroj etenditaj. Profunde enspiru per la nazo, retenu la spiron kiel eble plej longe kaj elspiru per la buŝo, kiam vi ne povas ĝin reteni. Tion faru 7 sinsekvajn fojojn. Poste, skuu la piedojn 30 fojojn. Tio povas forigi malvarman doloron en la brusto, ventro kaj

malsupraj membroj, tutkorpan doloron kaŭzitan de reŭmatismo kaj malvarmon en la membroj.

2. Metu unu manon sur la alian kaj per ili frotu la ventron (Bildo 2). Daŭrigu la frotadon de la subventro ĝis la brusto. Kuŝu surdorse kun la brakoj iom kurbigitaj. Levu la bruston ĉe la malrapida enspirado kaj malŝveligu la ventron ĉe la elspirado. Faru tion ripetfoje kaj sidigu. Kaptu la piedojn per la manoj (Bildo 3). Kuŝigu surdorse. Malstreĉu la brakojn. Profunde enspiru 12 fojojn. Retenu la spiron ĉe enspirado kaj imagu, ke la aero malleviĝu ĝis la akupunktura punkto *dantian*. Tio povas kuraci tutkorpan doloron, malfacilan movadon kaj doloron en la talio, dorso kaj spino, kaŭzitajn de reŭmatismo.

3. Kaŭru kun la kapo levita kaj korpo rektigita. Kruclu la brakojn (t.e., metu la maldekstran manon sur la dekstran ŝultron kaj la dekstran sur la maldekstran) kaj tenu ilin tuj sub la mentono kun la kapo senmova. Balancu la kubutojn 49 fojojn (enspiru ĉe la leviĝo de la kubutoj kaj elspiru ĉe la malleviĝo). Tenu la manojn kiel en la komenco. Pugnigu la manojn 21 fo-


jojn (enspiru ĉe la pugnigado kaj elspiru ĉe la malstreĉo). Mallevu la manojn kaj sidu rekte. Malstreĉu la korpon kaj atenton. Tio povas forigi la ŝveliĝon de la mamoj kaŭzitan de vento kaj malvarmo.

FEBLO

1. Leku la dentojn kaj lipojn ĉiumatene, por ke aperu pli da salivo en la buŝo. Gargaru la buŝon per la salivo kaj englutu ĝin. Per la malsupraj dentoj batu la suprajn 14 fojojn. Tion faru entute 3 fojojn. Tiu metodo estas saniga al la korpo kaj fortiga al la dentoj.

2. Sidu sur la kalkanoj kun la piedfingroj eksteren. Genuigu kaj forte turnu la genuojn eksteren. Samtempe kun tio, etendu la manojn dekstren kaj maldekstren respektive (Bildo 4). Laŭeble turnu la talion dekstren kaj maldekstren. Faru tion 21 fojojn. Tiu metodo povas forigi doloron en la talio, dorso kaj genuoj kaŭzitan de feblo kaj stomakan kaj lienan doloron kaŭzitan de malvarmo.

3. Staru surtere kun la piedoj kunmetitaj. Fleksu laŭeble la genuojn kaj kaŭriĝu. Samtempe kun tio, etendu la manojn, kruclu la fingrojn kaj metu la manplatojn malantaŭ la nukon kaj sur la ŝultrojn (Bildo 5). Tiru la manojn al la kapo kaj poste premu la kapon malsupren per la manoj kaj brakoj. Starigu, levu la manojn kaj la kapon. Tion faru 7 fojojn. Forte levu la manojn ambaŭflanke de la kapo kun la talio rektigita kaj piedoj senmovaj. La ofta ekzercado povas forigi feblon kaj lacon. ■



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj au/ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Gestudentoj de teknika lernejo dez. kor. kun gesamideanoj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Adr.: Valentin Ovčinnikov, Poŝtrestante, 199004, Leningrado, USSR.

* S-ro Juhani Kiviluoto dez. kor. tm. Adr.: Hemmet Fyren, Klappstigen 7, 34138 Ljungby, Svedio.

* Javier Andres Navarrete, 34-j. fraŭlo, dez. kor. kun esp-istoj inter 20-35j. Adr.: c/Pintor Benedito, 9, 46007-Valencia, Hispanio.

* Magsud. T. Tabriz dez. kor. tm. pri ĉt. Esperante kaj angle. Adr.: Chahar Rahe Abbasi, Rajai Str. 8 metry Riazi 59, IR-51556 Tabriz, Iran.

* Jupij Korsun dez. kor. kun gesamideanoj tm. pri ĉiuj temoj kaj interŝ. pm., bk. ktp. Adr.: P. Box-7, Shostka-7, Sumska obl, 245110, Ukrainio, USSR.

* D-ro Joaquim Cabral Netto, 51-j. advokato, universitata profesoro, dez. kor. kun fakuloj kaj studentoj pri kriminala kaj adopta leĝoj, aŭ aliaj juraj aferoj. Adr.: Rua Araguari, 1214 apt. 4, 30.190 — Belo Horizonte — MG — Brazilo.

* Adam Kowalski dez. kor. tm. Adr.: ul. H. Sawickiej 5/6, 67-400 Wschowa, Pollando.

* Lenka Švachova, 21-j. operatorino, dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri literaturo, muziko, historio, teatro kaj filmo. Adr.: Lenka Švachova, nam. Republiky 22, CS-301 12 Plzen, Ĉeĥoslovakio.

* Sekcio de E-invalidoj de ĈEA ŝatus ricevi omaĝe al la 5-a datreveno 1990 salutleterojn kaj bildkartojn el la tuta mondo por jubilea ekspozicio kaj festotagoj en junio. Antaŭdankon! Bonvolu skribi al: Olga Novakova, Foerstrova 13, 779 00 Olomouc, Ĉeĥoslovakio.

* Germano (lingvo-instruisto, 39-j) dez. kor. kun ĉinaj kaj ĉeĥaj student(in)oj, instruist(in)oj,

sciencist(in)oj ktp ekde 25-j. respektive en Beijing, Guangzhou, Shanghai, kaj Praha, Plzeň, Brno. Adr.: Bernd Kothe, Ginsterweg 2 W 77, D-3400 Gottingen, FR Germanio. Intereso: Ĉinio kaj ĈSR, lingvoj (ankaŭ la angla, franca, rusa ktp), lingvistiko, bk, libroj, muziko.

* Redaktoro Teuvo Laine, Sibeliuskatu 11 B 16, SF-13100 Haameenlinna Finnlando. Hobioj: Filmo, vojaĝado.

* Jolanta Šlikaite, 24-j. fraŭlino, volas korespondi pri diversaj temoj, interesiĝas pri muziko, vojaĝo ktp. Adr.: SU, Litovio, 235319 Panevežys, Grigo 37-502.

* Lech Grochulski, 41-j. oficisto, dez. kor. tm. pri ĉt, interesiĝas pri vojaĝo kaj tradicioj de aliaj landoj, kolektas pm., bk. kaj E-aĵojn. Adr.: 42-206 Czestochowa, ul. Zarecka 54/155, Pollando.

* Farkas Arnold, 10-j. lernanto, dez. kor. tm. Adr.: Str. Sovata 40 BL Q6 Ap. 10, 3700 Oradea, Rumanio.

* Geedzoj Maire (26-j.) kaj Toivo (30-j.) Otsmann, Harku 30 -1, 200016 Tallinn, Estonio, Sovetunio, dez. kor. tm. pri ĉio, ankaŭ elektrotekniko. Certe respondos.

* Johannes Palu, Esp-instruisto, Solme 21, SU 200016 Tallinn, Estonio, serĉas infanludojn por lernejoj kaj kluboj - vortludoj, enigmoj, kantludoj ktp. Reciprokos el sia kolekto.

* Kalman Imre, 16-j., volas kor. tm. pri ĉt. Adr.: 3050 Sighisoara, Str. M. Viteazul, nr. 54, ap. 19, Jud: Mures, Rumanio.

* Meteorologo dez. kor. kun samideanoj pri ĉt kaj interŝ. specialajn pm, kolorajn pk kaj fotojn. Adr.: Arno Resch, Weberstr. 46 1800 Brandenburg DDR.

* Volosciuc Paul dez. kor. tm. Adr.: 4925 Sighet, Str. Muncitorilor Nr 6, Rumanio.

* Dinko Pavlov, 49-j. maristo, dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri bildkartoj, poŝtmarkoj, muziko, sporto. Reciproka gastado eblas. Adr.: Bulgario, 8000-Burgas, Str. Car Samuil 61.

* Ireneusz Fiedorowicz, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj. Adr.: Zerom-

skiego 40, PL-19-500 Goldap, Pollando.

* Laima Krivickiene, 34-j. virino interesiĝas pri edukado de infanoj, vojaĝo. Adr.: a. k. 24, 235000 Jonava, Litovio, USSR.

* Rui Andrade, 29-j. komencanto, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Rua das Flores 385-E-207 Cep 24. 520, S. Goncalo-Rj, Brazilo.

* Maria Jagiello Dangow dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Str. Styczynskiego 37 m. 6, Gliwice-44-100, Pollando.

* S-ro Stojan Novaković, 45-j., volas kor. kun samideanoj pri ĉt, interesiĝas pri sporto, kulturo, muziko, naturo kaj E-movado. Adr.: Milaka Tešica 6/B, 76100 Brcko, Jugoslavio.

* Dalia Draugeliene, 30-j. inĝenerino, dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri popolkutimoj, kolektas kalendaretojn. Adr.: Partizanu 88-18, 233041 Kaunas, Litovio, USSR.

* Membroj de Esperanta urba grupo Eisleben dez. kor. tm. pri ĉt. Bonvolu indiki nomon, sekson, aĝon kaj intereson. Skribu al: Kulturligo de GDR, Esperanto Asocio, August Bebel Plau 7, Eisleben, DDR-4251.

* Atento! 16 bela pm el Irano nur kontraŭ 2 irk aŭ E-gazeto. Adr.: GH. R. Ebadi, P.O. Box 345, Mahshar, Irano.

* F-ino Behnaz Khorasanchi, 24-j., dez. kor. kun geesp-istoj tm. pri ĉt. Adr.: Dakheli-e 33, No 114, Kaj st. Dr. Fatemi Ave, Tehran 14317, Iran.

* 25-j. studento-interpretisto dez. kor. kun azianoj pri historio, ekonomio, homaj sciencoj. Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3820 Alken, Belgio.

* Anne Garazi dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj kaj interesiĝas pri klasika muziko. Adr.: Av. Thonex 8, 1225 Geneve, Svislando.

* Laura Vegyte, 13-j., dez. kor. tm., kolektas pm., glumarkojn, bk. kaj kalendaretojn. Adr.: Str. Gelvonu 51-5, 232010 Vilnius, Litovio, Sovetunio.

* Ivan Petrov dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: bul. Mogilev 35, ap. 10, 5300 Gabrovo, Bulgario.

WEI LIAO:

“Ora ŝlosilo” por memorado



S-ro Wang Wei

EN amuza kunveno okazigita de la Centra Televizia Stacio de Ĉinio junulino Yang Shuo afable akceptis demandojn de spektantoj. Kiam iu citis unu ideogramon laŭplaĉe el vortaro Xinhua (Ŝinhŭa) kun pli ol 10 000 artikoloj, Yang Shuo povis tuj respondi, en kiu linio de kiu paĝo ĝi troviĝas. En alifoja prezentado de rapida memorado iu junulino senerare skribis 600 ciferojn post la decimala komo de cirkonferenca kvociento; iu junulo parkerigis 50 vortojn eldiritajn de spektantoj. Post kelkaj minutoj li povis tuj respondi senerare demandojn de spektantoj pri la vortoj. Ili ĉiuj estas membroj de la Memor-esplora Instituto de Jinzhou (Ĝinĝoŭ), Liaoning-provinco.

Antaŭ nelonge mi vizitis la instituton.

Ĝia prezidanto Wang Wei diris al mi, ke li “devigite” entreprenas memoran esploradon.

La 38-jara Wang Wei antaŭe estis tubisto. Antaŭ 9 jaroj li studis historion kaj la ĉinan lingvon en la koresponda kurso de Liaoning-universitato. Tiam li okupiĝis ankaŭ pri verkado de “Demandoj kaj Respondoj pri Tu-

baj Teknikoj”. Li ne havis multan tempon por la pli kaj pli peza lernado. Li cerbumadis kaj trovis originalan memor-metodon. Rezulte, li atingis bonan sukceson ankaŭ en la ekzameno, kiam lia verko eldoniĝis.

Ekde tiam li havis fortan intereson por memor-esploro. Li kaj kelkaj junuloj organiziĝis en memlernan grupon. Ili aĉetis koncernajn librojn kontraŭ centoj da juanoj kaj vizitis telefonistojn, policanojn pri loĝantaraj aferoj kaj eĉ biciklo-gardistinojn, kiuj havas bonan memoron. Post plurjara klopodo ili posedas materialojn por memorado kun proksimume dek milionoj da ideogramoj. Dank’ al sia senĉesa esplorado ili fine kompilis libro-serion “Praktika Memorado”, inkl. “Rapidan Memoradon”, “Logikan Memoradon”, “Mekanikan Memoradon” kaj “Memorhelpan Gimnastikon”. Post 3-monata lernado en la kurso kaj koresponda kurso de praktika memorado fonditaj de ili la kursanoj scipovas “ekstravagancan memorigon”, “determinan memorigon”, “ciferman memoradon” kaj “homofonan memoradon”. Konsiderante ilian kontribuon en la memora scienco, koncerna instanco sankciis ilian instituton, oficiale fonditan en

Ĉinio por esplori memorajn leĝojn kaj disvastigi sciencajn memorajn metodojn.

Parolante pri la konkretaj memoraj metodoj, Wang Wei diris al mi, ke ili estas ekstravagancaj kaj interesaj. Se oni volas memori la ĉefajn verkojn de la fama rusa verkisto I. S. Turgenev, oni provu jenan memorigon: Turgenev kaj “Rudin” estas “Patro(j) kaj Filo(j)”, ili eniras en “Neston de Nobeloj” “En la Antaŭvespero” kaj foliumas “Notoj de Ĉasisto” en “Fum(ad)o”. Tiel la ĉefaj verkoj de la verkisto estas kunligitaj kaj neforgeseblaj.

La instituto faris similan eksperimenton en la unua klaso de literatura fako de iu supera mezlernejo. La rezulto montris, ke la lernantoj akiris en ekzameno pri historio poentojn meznombro je 13 pli altajn ol la lernantoj tuj super sia klaso.

La instituto faris korespondan instruadon jam al pli ol 600 000 personoj. Iu mezlernejano skribis en sia letero: “Praktika Memorado” kvazaŭ injektis al mia korpo novan sangon. Mi estas plena de memfido, ĉar mi ricevis ‘oran ŝlosilon’ por memorado!” ■

Ĉina ŝako (III)

de RONG HUI

ROLOJ DE LA ŜAKPECOJ

Varias la roloj de malsamaj pecoj en la ĉina ŝako. Oni havas eblecon gajni ludon nur tiam, kiam li bone konas la rolojn de ŝakpecoj kaj ĝuste manovras ilin.

La ĉaro estas la plej forta peco el ĉiuj, iaokaze ĝi estas pli forta ol ĉevalo kaj kanono kune. Se ĉaro okupas lokon sur limrivera linio, aŭ tiun de la 4-a aŭ la 6-a orta linio, ĝi povas multe helpi atakon aŭ defendon de aliaj pecoj siaflankaj.



La ĉevalo kaj kanono estas preskaŭ samgravaj. Ĝenerale, en la komenca kaj meza stadioj, kiam la pecoj de ambaŭ partioj estas ankoraŭ multaj, la kanono estas iom pli forta ol ĉevalo dank' al sia rapideco, dum en la fina stadio, kiam la gvardianoj kaj elefantoj estas nekompletaj, la ĉevalo fariĝas pli forta ol la kanono, kiu perdas forton pro manko de afustoj. Unu ĉevalo povas regi ok punktojn ĉirkaŭe (vd. bildon 1). Ĝi ludas gravan rolon meze de la tabulo, sed, kiam ĝi saltas sur limlinion aŭ en angulon, ĝi tuj malfortiĝas kaj fariĝas facile kaptebla.

La soldato ĝenerale ludas nur akcesoran rolon. Antaŭ transiro de la limrivero, la soldato estas malfora kaj ludas nur kontaktan aŭ obstrukcan rolon. Transirinte la

limriveron kaj enirinte en la palacon, ĝi fariĝas tre forta kaj povas helpi aliajn siaflankajn pecojn matigi la ĉefgeneralon de la rivalo. En la fina stadio unusola soldato povas matigi la ĉefgeneralon de la rivalo kondiĉe ke la kontraŭa partio havas nur ĉefgeneralon.

La gvardiano kaj elefanto funkcias kiel gvardio de la ĉefgeneralo. Gardante sian ĉefgeneralon, iaokaze kunhelpas aliajn pecojn en atakado. Ĉu en la komenca, ĉu en la meza aŭ fina stadio, la aparta kaj kuna defendoj de la gvardianoj kaj elefantoj estas tre gravaj. Se la gvardianoj kaj elefantoj de unu

Bildo 1



partio estas kompletaj, do ili povas sukcese defendi kontraŭ unuĉara atako de la rivalo.

La ĉefgeneralo, gvidanto de la tuta armeo, estas gardata de siaj militfortoj. Se unu partio perdas sian ĉefgeneralon, ĝi perdos do la ludon malgraŭ ke ĝia armeo estas pli forta ol tiu de ĝia rivalo. Kvankam malpermesata eliri el la palaco, la ĉefgeneralulo povas kapti malamikajn pecojn en la kadro de la palaco. Al la ĉefgeneralulo estas malpermesate ankaŭ stari sur la sama linio, frontante unu kontraŭ la alia. Oni povas profiti la regulon por bridi malamikan pecon. Vd. bildon 2, la ruĝa ĉevalo povas kapti la briditan nigran ĉevalon.

Preni ŝakpecojn

Sur tablo estas 30 ŝakpecoj (aŭ sojfaboj, butonoj ktp.). Du homoj deprenas ŝakpecojn el ili alterne. Ĉiufoje unu homo povas preni 1-6 ŝakpecojn. Tiu, kiu sukcesas forpreni la lastajn ŝakpecojn de sur la tablo, gajnas la ludon.

Ĉu vi povas ĉiufoje gajni la ludon, se vi prenas la unua? Provu. (Solve en la sekva numero)

ĈINA PUZLO

Floroj



Pu Songling kaj lia “Strangaĵoj de Liaozhai”

de MEI ZHI

Pu Songling (1640-1715) vivis en la unuaj jaroj de Qing-dinastio (1644-1911). Lia novelaro “Strangaĵoj de Liaozhai” faris lin fame konata novelisto en Ĉinio.


Pu Songling ne antaŭvidis, ke post centoj da jaroj li vivas ankoraŭ en la koro de la popolo kaj lia novelaro fariĝis mejloŝtono en la historio de la ĉinaj noveloj. Li naskiĝis en intelektula familio, kiu dekadencis jam en la tempo de lia avo. Lia patro devigite forlasis la intelektulan vivon kaj sin okupis pri komercado. Pu Songling vivis pli malriĉe. Influante de la socio kaj familio li donis grandan atenton al sinpreparado por la ŝtata oficistiga ekzameno. En la aĝo de 19 jaroj li gajnis tri unuajn lokojn en loka ekzameno kaj famiĝis por ia tempo. Sed li malsukcesis en la sekvantaj ekzamenoj. En la aĝo de 31 jaroj li funkciis unu jaron kiel asistanto de guber-

niestro. En la postaj jaroj li instruis ĉefe en kamparo kaj ĉiujare partoprenis en la ŝtata ekzameno, sed neniam sukcesis. Li, malriĉa intelektulo, mortis en la aĝo de 75 jaroj.

Pu Songling estis talenta literaturisto kaj fekunda verkisto. Krom la supre menciita novelaro li verkis ankaŭ multajn poemojn, ci-ojn, operojn k. a. Pu Songling komencis sin okupi pri verkado de “Strangaĵoj de Liaozhai” en la aĝo de 20 jaroj kaj fundamente plenumis ĝin post 20 jaroj. Poste li faris senĉesan poluradon kaj kompletigon. Tial la novelaro fariĝis kristaliĝo de lia tutviva penado.

La novelaro estis verkita per rafinita kaj vigla lingvo. “Liaozhai” estis nomo de la legoĉambro de la aŭtoro. En la tempo, kiam vivis Pu Songling, la regantaro praktikis rigran, altpreman politikon en

la kampo de kulturo. La regantoj malpermesis ĉiun ajn skribaĵon malkontentan al la socia realo, sekve de tio multaj literaturistoj estis enkarcerigitaj kaj iliaj familianoj estis implikitaj. Pu Songling estis malkontenta pri la malluma socio, sed ne povis rekte esprimi sian penson, li do prezentis sian indignon per mitoj kvazaŭ senrilataj al la reala socio. “Strangaĵoj de Liaozhai” el proksimume 500 noveloj plejparte temas pri feoj de floroj kaj vulpoj, pri fantomoj en la hadeso. La verkisto donis al fantomoj kaj feoj de floroj kaj vulpoj homajn karakterojn per brilaj priskriboj, havigis al ili superhoman forton kaj tiel prezentis idealajn personojn kaj vivan medion. Samtempe kun tio, li implikis la fantomojn kaj feojn en la realan socian vivon kaj vivovere spegulis la realajn kontraŭdirojn kaj mallumon en la medio, kie kune vivis fantomoj kaj homoj. Tiuj trajtoj faris la novelaron rava kun abundaj kaj ekstravagancaj imagoj kaj ŝanĝiĝemaj intrigoj en mirakla mondo.



Portreto de Pu Songling

“Grilo” el la novelaro estas tipa verko, kiu malkaŝas subpremon de feŭda reganto al la popolanoj. La imperiestro ŝategis grilan luktadon kaj ĉiujare rekvi- ziciis grilojn de popolanoj. Profitante de la ŝanco por akiri la favoron de superuloj, la flatemaj lokaj ŝtat- oficistoj senbride ĉantaĝis la popolon. Tio kaŭzis familian tragedion al Cheng Ming, heroo en la nov- elo. La honesta Cheng Ming neniel povis kontentigi la nesatigeblan postulon kaj preskaŭ bankrotis. Ven- kinte grandajn malfacilojn, li kaptis fortan grilon, sed ĝin mortigis lia 9-jara filo preteratente. En mal- trankvilo kaj kolero li subite trovis, ke lia filo sin mortigis pro timo. Poste lia filo reviviĝis, sed ties animo ŝanĝiĝis en bravan grileton. Cheng Ming tri- butis ĝin al la palaco kaj pro tio savis sin de la malfeliĉo. Tio estis animskua rakonto. Ĝi bildigis kruelan fizikan kaj spiritan persekutadon al malri- ĉuloj en la feŭda socio: En senespero ili devigite transformiĝis en amuzilon de regantoj.

“Xi Fangping” rakontas, kiel filo venĝas sian pa- tron. La patro de Xi Fangping mortis de misakuzo. Por venĝi la patron, lia animo venis al la hadeso por akuzi la malamikon. Li foje-foje suferis kruelan turmentadon de bastonado, fera fajro-lito, korpa dissegado k. a. Xi, nefleksebla, fine akiris helpon de la ĉiela dio, la misakuzinto estis punita kaj la patro reviviĝis. La rakonto spegulis malversacion kaj dam- nindan konduton de diversaj oficistoj en la feŭda socio kaj solide vipis tiujn demonojn pere de la verdikto de la ĉiela dio. La venĝanto Xi Fangping spegulis la justamon de la aŭtoro kaj lian kontraŭ- staron al la perversaj fortoj.

Estis senkompata la malkaŝo de la damninda feŭ- da socio far Pu Songling. La novelo “Nie Zheng” priskribis stultan nobelon, kiu rabis belan virinon al si. “En Songŝo” bildigis despotan ĉefministron. “Reĝo” priskribis monavidan provincestron. “Yan- zhi” bildigis nebulkapan guberniestron, kiu neglek- tis vivon de popolanoj. La verkisto priskribis pres- kaŭ ĉiajn regantojn kaj iliajn lakeojn, de imperies- tro, reĝo ĝis arestistoj, kaj klare vidigis la putran esencon de la feŭdaj burokratoj. Samtempe kun tio, li priskribis ankaŭ mizeron de la persekutataj, mal- riĉaj kaj bonkoraj popolanoj. Iliaj sango kaj larmoj montris profundan kompaton de la verkisto.

En “Strangaĵoj de Liaozhai” estas pluraj noveloj, kiuj malkaŝas kaj mokas la ŝtatekzamenan sistemon de Ĉinio. Pu Songling bone konis la ŝtatekzamenon kaj suferis multe de tio, tial! malkaŝo estas pro- funda. La verko “Si Wenlang (kultura Administra- cestro)” faris akran mokon al la sistemo. Ĝi bildigis blindan bonzon, kiu flarinte cindrigitan artikolon povas distingi bonan artikolon dis de la malbona. Flarsentinte cindrigitan artikolon de la juna intelek- tulo Wang, li diris: “Vi komence lernis de famuloj, kvankam ne perfektigis via artikolo, tamen ĝi estas proksima. Mi ĵus legis ĝin.” Poste kiam li flaris tiun

de la juna intelektulo el Yuhang, li diris tusante: “Ne plu prezentu! Mi ne povas engluti ĝin. Se vi plu bruligos, mi vomos.” Sed la ŝtata ekzameno anoncis, ke la intelektulo el Yuhang sukcesis en la ekzameno, dum Wang malsukcesis. Informiĝinte pri tio, la bon- zo diris suspire: “Kvankam mi estas blinda je la okuloj, tamen ne je la nazo. La ekzamenantoj estas blindaj kaj je la okuloj kaj je la nazo!” La ekzamen- antoj en la noveloj de la aŭtoro estis aŭ blindaj je la okuloj kaj nazo aŭ monavidaj.

Kvankam Pu Songling ne povis radikale nei la ŝtatekzamenan sistemon, tamen li kritikis tiujn per- sonojn, kiuj strebis nur al ŝtata rango pere de la ekzameno, kaj laŭdis tiujn, kiuj ne fleksiĝis antaŭ la ekzameno.

Granda parto de “Strangaĵoj de Liaozhai” temas pri amo. Ili plejparte forte odoris spiriton kontraŭ la feŭdisma etiko. Iuj el ili prezentis idealan amon de la aŭtoro pere de amo inter homoj, fantomoj, feinoj de floro kaj vulpo. Ekz., “Yingning”, “Lianxiang (Ljanŝjang)”, “Xiangyu (Ŝjangju)” k. a. prezentis liberan amon de gejunuloj en la epoko sen ama libero. En “Xiangyu” la juna klerulo Huang enami- ĝis en Xiangyu, feinon de blanka peonio. Malfeliĉe la peonio estis translokita al alia loko. Huang ploris ĉe la fosaĵo ĉiutage. Tio fine kortuŝis la diinon de floroj. La diino revivigis Xiangyu. En “Lianxiang” la virina fantomo Li amis junan klerulon Sang, de tio Sang tamen serioze malsaniĝis. Ŝi do kontraŭvole forlasis lin, ne revenis al la tombo kaj ŝvebis laŭ vento, fine ŝi venis al la familio Zhang. Ŝia animo tie kuniĝis kun la ĵus mortinta knabino de Zhang. Ŝi revivigis kaj feliĉe edziniĝis al Sang. En la novelo “Xiaoxie (Ŝjaŭŝje)” la virinaj fantomoj Qiorong (Ĉiŭjong) kaj Xiaoxie komence prenis la junan kle- rulon Tao kiel sian mastron. Poste Tao estis maljuste enkarcerigita, Qiorong kaj Xiaoxie multe klopodis por savi lin. En la batalo kontraŭ herezaj fortoj ili helpis kaj enamiĝis unu al la alia kaj fine geedziĝis. Tio estis neimagebla en la feŭda socio, en kiu soci- etemo inter gejunuloj estis malpermesita.

En tiuj noveloj la aŭtoro bildigis multajn hones- tajn virojn, kiuj donis sian koron al la amatino, kaj samtempe priskribis multajn amindajn virinojn. El ili iuj estis teneraj kaj ĉarmaj, aliaj neŝanceleblaj en la amo, triaj malkaŝemaj kaj kuraĝaj, kvaraj honte- maj kaj timemaj kaj la ceteraj minacate de demonoj devigite tentis virojn sed tamen bonkoraj... Ili estis belaj, saĝaj kaj sentimentalaj, ĉiu prezentis kortuŝan historion.

“Strangaĵoj de Liaozhai” havas ankaŭ negativan kaj postigiĝintan enhavon, kiu spegulis ideologian lim- igitecon de la aŭtoro. Sed “Strangaĵoj de Liaozhai” atingis kulminon de la ĉinaj noveloj ĉu ideologie ĉu arte. ■

Qingfeng

(El la novelaro "Strangaĵoj de Liaozhai")

EN Taiyuan estis granda domo de burokrato-bienulo Geng. Poste dekadenciĝis la familio, kaj duono de la sennombraj konstruaĵoj kadukiĝis. Pro tio strangaĵoj estiĝis en la domo. La pordoj de haloj fermiĝis kaj malfermiĝis per si mem en noktomezo, kio teruris la domanaron. La tuta familio do transloĝiĝis en la vilaon kaj lasis la domon al maljuna pordisto. De tiam la domo pli kadukiĝis, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis gaja interparolado kaj muziko.

La mastro de la domo sinjoro Geng havis nevon nomatan Geng Qubing. Li estis junulo senbrida kaj sentima. Li petis la pordiston tuj informi lin, kiam li ion strangan rimarkos.

Iun nokton la pordisto rimarkis flagran lumon en la domo kaj tuj iris informi Geng Qubing. La junulo intencis aliri por esplori. La pordisto malkonsilis al li, sed la junulo insistis kaj iris tien.

Li bone konis la vojon en la domo kaj trahakis al si la vojon ŝirmitan de artemizio. Kiam li atingis la ĉambron, li aŭdis mallaŭtan interparoladon. Li kaŝrigardis enen kaj vidis, ke brile lumis du kandellegoj. Maljuna intelektulo sidis vizaĝe al la sudo, kaj kontraŭ li sidis sinjorino. Oriente de ili sidis junulo ĉ. 20-jara kaj apud li adoleskantino 15-jara. Ili sidis ĝoje interparolante ĉirkaŭ tablo plenkovrita de pladoj. Geng Qubing enstrudiĝis kaj laŭte sin anoncis kun rideto:

"Jen venas gasto neinvitita!"

Ĉiuj surpriziĝis kaj kaŝiĝis. Nur la maljunulo demandis kun riproĉa mieno:

"Kiu vi estas? Kial vi enstrudiĝis en alies buduaron?"

"Tie ĉi estas mia hejmo, sed nun vi okupas. Ĉu estas dece, ke vi amuziĝas sen inviti la mastron de la domo?"

La maljunulo pririgardis Geng kaj diris aserte:

"Vi ne estas la mastro."

"Mi estas Geng Qubing, nevo de la mastro."

"Delonge mi aŭdis pri via sinjora moŝto!" Li salutis Geng, ĝentile petis lin altabliĝi kaj ordonis al servisto ŝanĝi la pladojn. Geng malkonsilis tion. La intelektulo tostis por Geng, kaj tiu diris:

"Ni estas intimaj kiel samfamilianoj, kaj viaj familiaĵoj ne bezonas eviti. Bonvolu alvoki ilin por kune drinki."

La maljunulo do vokis "Xiao-er", kaj ĉe la voko eniris la junulo de ekstere.

"Tio estas mia filo," prezentis la maljunulo. Ili reciprokis saluton kaj demandis pri la familia deveno respektive. La maljunulo prezentis, ke lia familia nomo estas Hu. Geng estis senĝena kaj sprita en konversacio, kaj ankaŭ Xiao-er estis de la sama kategorio de karakteroj. Geng aĝis 21 jarojn kaj Xiao-er 19 jarojn. Ili ekŝatis unu la alian kaj fratiĝis.

La maljunulo diris al Geng:

"Mi aŭdis, ke viaj prapatroj verkis la 'Ekstera Biografio de Tushan', ĉu vi scias tion?"

"Jes, mi scias."

"Mi ja estas posteulo de Tushan. La genealogion de mia familio post Tang-dinastio mi memoras, sed tion antaŭ la Kvin Dinastioj mi ne aŭdis. Mi petas vian konigadon."

Geng Qubing lakone parolis pri la geneologio multe komplimentante. La maljunulo ekĝojis kaj diris al sia filo:

"Hodiaŭ estas celebrinda tago, ke mi informiĝis pri kio mi neniom sciis antaŭe. Sinjoro Geng ne estas fremda por nia familio. Vi iru venigi vian patrinon kaj Qingfeng, ke ankaŭ ili aŭdu la grandan meriton de niaj prapatroj."

Xiao-er foriris malantaŭ la kurtenon kaj post momento eniris la sinjorino kaj knabino. La knabino estis tiel delikata kaj ĉarma, ke oni ne povis trovi similan belulinon en la mondo.

La maljunulo prezentis ilin al Geng:

"Tiu estas mia edzino. Tiu ĉi estas mia nevino Qingfeng. Ŝi estas tre saĝa kaj havas bonegan memoron, tial mi venigis ŝin, ke ŝi memoru la genealogion."

Post interparolo estis drinko. Geng fiksitis la rigardon sur la fraŭlino. Tion rimarkinte, ŝi mallevis la kapon. Geng kaŝe surtretis ŝian delikatan piedon. Ŝi tuj retiris la piedon sen koleri. En raviteco Geng ne povis plu bridi sin en la pasio kaj kriis frapante sur la tablon:

"Mi preferas vivi kun tia belulino ol esti reĝo!"

Rimarkinte lian insolentecon de ebriiĝo, la sinjorino foriris kun Qingfeng. Geng deprimiĝis kaj adiaŭis la maljunulon. Sed li neniel povis forgesi Qingfeng.

En la sekvanta nokto li refoje iris al la domo. Tie ankoraŭ bonodoras belŝmiraĵoj. Li atendis la tutan nokton, sed nenian bruon li aŭdis. Li revenis hejmen kaj interkonsiliĝis kun la edzino, por ke la tuta familio transloĝiĝu en la domon. Lia edzino malaprobis. Kun la espero revidi Qingfeng, Geng sola transloĝiĝis en la domon kaj legis en la suba ĉambro.

Iun nokton, kiam Geng estis leganta ĉe la tablo, eniris fantomo kun longa, nekombita hararo kaj karbenigra vizaĝo. La fantomo rigardaĉis al Geng. Geng ekridis, trempis la fingron en la inkfrotujon kaj nigrigis sian vizaĝon. Li rigardis al la fantomo rekte en ĝian vizaĝon. La fantomo hontiĝis kaj fortiriĝis.

En la sekvanta nokto, kiam Geng pretis estingi la lumon kaj enlitiĝi, li aŭdis malrigladon. Li tuj leviĝis, kaŝobservis kaj vidis, ke la pordo jam estis duonmalfermita. Tuj poste li aŭdis delikatan paŝbruon kaj vidis kandellumon en la supra ĉambro. Li pririgardis kaj

trovis, ke tie estas Qingfeng. Surprizite de lia apero, ŝi returnis sin kaj fermis la pordon. Geng genuiĝis kun peto:

“Mi faras riskon ja pro vi. Nun neniu ĉeestas, kaj mi petas manpremi vin. Se tion vi promesos, mi ne bedaŭros, eĉ se mi mortos.”

Qingfeng respondis post la pordo:

“Ĉu mi ne scias, ke vi forte amas min? Sed mia onklo estas tre rigora pri la virinaj moraloj, kaj mi ne kuraĝas konsenti kun vi.”

Geng petegis en afliktiĝo:

“Intertuŝiĝon kun vi mi ne kuraĝas revii, se vidi vin mi ambicias.”

Ŝajne ŝi ŝanceliĝis. Ŝi malfermis la pordon kaj tiris Geng je lia brako. Geng ekstaziĝis. Ili malsupreniris, brakumante unu la alian.

“La sorto destinis por ni la hodiaŭan renkontiĝon. Sed de morgaŭ vi ja ne povos plu vidi min,” diris Qingfeng.

“Kial?”

“Mia onklo ne ŝatas vin pro via troŝengeneco kaj aliformiĝis en teruran fantomon por fortimigi vin, sed vi ne estis terurita. Hodiaŭ li jam luis novan domon. Nun ĉiuj transloĝiĝis tien kaj mi sola restos ĝis morgaŭ.” Qingfeng intencis foriri, dirante: “Baldaŭ revenos la onklo.”

Geng baris al ŝi la vojon kaj intencis kuŝi kun ŝi. Dum ŝia rifuza repuŝado eniris la onklo. En ekstrema hontiĝo Qingfeng klinis la kapon, staris apoge al la lito kaj senparole fingrumadis la zonan.

La onklo kriis en kolero:

“Fi, malĉastulino, vi malhonoras mian familion! Tuj iru for! Se ne, skurĝon vi ricevu!”

Qingfeng haste eliris kaj ŝin sekvis la onklo.

Geng ŝtele postiris por subaŭskulti kaj aŭdis, ke la onklo senkompate riproĉadis kaj Qingfeng ploris. Geng korŝire ĉagreniĝis kaj per la tuta gorĝo kriis:

“Mi kulpas en tio, sed ne Qingfeng. Se vi indulgos ŝin, mi volonte estos punata eĉ je dispecigo de la korpo.” Post kelke da tempo silentiĝis en la domo kaj Geng iris dormi. Post tio nenia bruo aŭdiĝis plu en la domo.

La onklo de Geng miris de la okazaĵo kaj volis vendi al li la domon en ajna prezo. Geng ĝoje aĉetis la domon kaj enloĝiĝis kun la familio. Geng komforte pasigis unu jaron en la domo kaj ĉiam sopiris al Qingfeng.

Iun printempan tagon, revenante de la vizito al la tombo, Geng vidis, ke du malgrandaj vulpoj estas persekutataj de hundo. Unu el ili forkuris kaj la alia timplene kaŭris meze de la vojo. Vidinte Geng, la vulpo dolore blekis kaj klinis la kapon, kvazaŭ petante savon. Geng kompatis ĝin, prenis ĝin kaj kunportis ĝin hejmen.

Reveninte hejmen, li fermis la pordon kaj metis la



vulpon sur la lito. La vulpo tuj aliformiĝis en Qingfeng. Geng ekstreme ĝojiĝis kaj konsolis ŝin.

“Ĵus mi kaj mia servistino distriĝis surkampe, kaj nin trafis la danĝero. Sen via helpo mi ja estus disŝirita de la hundo. Mi esperas, ke vi ne abomenos min pro mia nesamspeculeco,” petis Qingfeng.

“Ĉiumomente mi havas vin en mia koro. Vi estas por mi valorega trezoro, kial do mi malŝatus vin?”

“Ĉio estas destinita! Kiel ni povus revidiĝi sen la malfeliĉaĵo? La servistino certe iris informi, ke mi jam pereis, sekve mi povos resti ĉiam ĉe vi.” Geng tre ĝojiĝis kaj loĝiĝis ŝin en alia domo.

Iun tagon post du jaroj, kiam Geng estis leganta, venis Xiao-er. Geng ĉesis legi kaj demandis en miro, de kie li venas. Xiao-er kliniĝis ĝistere kaj petis malgaje:

“Mian patron trafos danĝero, kaj krom vi neniuj povos savi lin. Li intencis veni peti vin per si mem, sed li skrupulis, ke vi rifuzos al li, kaj alsendis min.”

“Kio okazos?”

“Jes, li estas filo de mia kunlernanto.”

“Ĉu via sinjora moŝto konas Mo Sanlang?”

“Jes, li estas filo de mia kunlernanto.”

“Morgaŭ li preterpasos vian domon. Se li portos kun si vulpon, bonvolu peti de li la vulpon.”

“Mi ne povas forgesi la ofendon de via patro, kaj mi ne entrudiĝos en lian aferon. Se li nepre bezonas mian helpon, min petu Qingfeng.”

Kiu estas la vera posedanto de la silko?

TIO okazis antaŭ tre longa tempo.

Kampano iris al foiro en urbo por vendi fajnan silkon, kiun li mem teksis. Survoje ekpluvegis, kaj nekonata vojiranto petis lin, ke li ŝirmu lin kontraŭ la pluvo per la silko. La kampano konsentis, kaj ili kune iris sub la ŝirmo de la silko.

Kiam ili atingis la urbon, ĉesis la pluvo. La kampano intencis enpaki la silkon, sed la nekonato firme tenis la silkon pretendante, ke li estas la posedanto de la silko. Ili disputis pro la silko kaj neniu el ili cedis. Fine ili venis al la juĝejo por peti helpon.

La juĝisto estis tre saĝa. Li aŭskultis ilian akuzon kaj pripensis kelke da tempo. Subite li levis la kapon kaj diris laŭte frapante la tablon:

“Kiu povus juĝi tian aferon! Kiom valoras la silko, ke vi venas

ĝeni min pro la bagatelo!”

Dirinte, li ordonis dividi la silkon en du partojn, doni al la du akuzintoj po duonon de la silko kaj elpeli ilin.

Kiam foriris la akuzintoj, la juĝisto tuj sendis sekvi ilin por subaŭskulti, kion ili diros. Li ordonis ankaŭ, ke la senditoj tuj kaptu ilin, se ili plendos kontraŭ la juĝo.

Elirinte el la oficejo, la vojiranto tuj ĝoje diris al la ĉeestantoj:

“La juĝisto estas tre saĝa. Sen lia justa juĝo mia silko estus tute forrabita de tiu aĉulo.”

Sed la kampano plendis malkontente:

“Fi al la stulta juĝisto! Pro lia stultaĵo duono de mia silko estis forrabita de la trompinto.”

La du senditoj, kiuj sekvis ilin, tuj kaptis ilin kaj revenigis ilin al la juĝisto. La ĉeestantoj estis tre mal-



trankvilaj pri la kampano, kiu insultis la juĝiston.

Sed ekster la atendo de la publiko, la juĝisto rekomencis la juĝon:

“Tiu, kiu insultis min, estas la vera posedanto de la silko. Lia intereso estis damaĝita, do kompreneble li malkontentiĝis kaj insultis min. La alia dankis min pro tio, ke mia unua juĝo ebligis al li alproprigi al si alies silkon.”

La malhonestulo neniel povis sin senkulpi. Li timeme genuiĝis kaj senĉese frapis la kapon kontraŭ la teron por peti indulgon. ■

“Franjo Qingfeng mortis jam antaŭ tri jaroj,” kun larmoj diris Xiao-er.

“Se tiel, pli profundiĝas mia malamo!” Tion dirinte, Geng eklegis per laŭta voĉo, eĉ rigardon ne ŝetis al Xiao-er.

Xiao-er leviĝis kaj foriris en plorego.

Geng iris al la loĝejo de Qingfeng kaj diris al ŝi la aferon. Qingfeng paliĝis de maltrankvilo:

“Ĉu vi ne promesis?”

“Mi savos lin. La ĵusan rifuzon mi ŝajnis nur por venĝi min kontraŭ lia arbitraĵo.”

“Mi orfiĝis jam en la infaneco kaj min vivtenis la onklo. Antaŭe li ofendis vin, sed tamen li nur intencis kondukti konforme al la moraloj,” trankviliĝis Qingfeng.

“Vi diris prave, sed tamen estas malfacile tuj forigi la ofendiĝon el la memoro. Se vi mortus, mi certe ne promesus savi lin,” diris Geng.

“Ha, senkompatema!”

En la sekvanta tago vere preterpasis Mo Sanlang rajdanta sur ĉevalo lukse ornamita. Lin sekvis ĉaspelantoj en impona nombro. Geng bonvenigis lin antaŭ sia domo. Li trovis inter la ĉasaĵoj nigran vulpon sangan-

tan. Li palpis ĝin kaj sentis, ke ĝi estas varmeta. Li do petis tion de Mo Sanlang pretekste, ke li volas fliki sian peltaĵon. Mo Sanlang volonte donacis ĝin al li. Geng transdonis la vulpon al Qingfeng kaj invitis Mo al drinkado.

Kiam la gastoj foriris, Qingfeng tuj ĉirkaŭprenis la vulpon en siaj brakoj kaj post tri tagoj la vulpo rekonsciigis kaj aliformiĝis en la maljunulon. Li multe miris vidinte Qingfeng. Qingfeng rakontis al li la danĝeran okazaĵon, kaj li tuj iris al Geng por danki kaj peti pardonon.

“Mi ja ne kredis, ke vi mortis. Hodiaŭ konfirmiĝis mia juĝo,” diris la onklo al Qingfeng.

“Se vi estas simpatia al mi, mi petas vin pruntedoni ĉambrojn al mia onklo, por ke mi povu iele rekompencian vivtenadon,” Qingfeng diris al Geng.

Geng kapjesis kaj la onklo foriris kun honta mieno.

Tiuvespere la tuta familio de la onklo transloĝiĝis ĉe Geng, kaj ĉiuj vivis kiel samfamilianoj. Xiao-er ofte konversaciis kun Geng kaj manĝis ĉe li. Kiam la filo de Geng atingis lernoagon, Geng petis Xiao-er klerigi lin, kaj tiu verŝajne estis kompetenta pedagogo. ■

La purpura lando

Urugvajo

POST kiam Kolumbo malkovris Amerikon en 1492, homoj ekspediciis unu post alia al tiu izolita kontinento por esplori ĝian misteron. En 1519 floto gvidata de marnavigisto Fernão de Magalhães venis en la riveron La-Plato en la sudorienta parto de Sud-Ameriko. Portugala maristo staranta sur la pruo subite rimarkis kalvan monton antaŭ/ si kaj ekkriis: "Montevideo!" La vorto en la portugala lingvo signifas "mi vidis monton". Montevideo poste fariĝis la nomo de la ĉefurbo de Urugvajo.


La nomo de la lando devenas de la rivero Urugvajo. Urugvajo en la indiana lingvo signifas ripozlokon de birdo kun bunta plumaro. Same kiel aliaj latin-amerikaj landoj, la bela Urugvajo fariĝis kolonio unue de Portugalio kaj poste de Hispanio. En 1811-1820 la nacia heroo José Gervasio Artigas gvidis sian popolon por batali kontraŭ/ la koloniisma regado. La 25-an de aŭgusto 1825 Juan Antonio Lavalleja kun patriotaj batalantoj reprenis Montevideon kaj deklaris sendependiĝon de la ŝtato, kiu ricevis la nomon Orient-borda Respubliko de Urugvajo.

Urugvajo en la subtropika zono baniĝas ĉiam kiel en printempo, kun jara meza temperaturo de 17°C. Printempe en la aero regas purpura nebulo kaj sur la herbejoj disvolviĝas purpuraj floroj. Iu brita aŭtoro, ravita de la bela pejzaĝo, verkis en 1885 la libron "Purpura Lando" priskribantan naturajn pejzaĝojn de Urugvajo. Poste "Purpura Lando" fariĝis alia nomo de Urugvajo. ■



Fingroformaj skulptaĵoj sur duoninsulo de Urugvajo


Skulptaĵoj en Montevideo





La strato "18-a de Julio" en Montevideo

En infana parko



RIVERA VOJO

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN kaj XU YE

TRAPASINTE la antikvan vojon Lingguan, ni suriris alian ĉefan vojon Wuchidao.

Wuchidao de la Suda Silka Vojo etendiĝis de la urbo Chengdu suden, trapasis Leshan, Zhaotong kaj Kunming, kuniĝis kun la vojo Lingguan ĉe Dali kaj poste etendiĝis okcidenten...

La unua sekcio de Wuchidao de Chengdu ĝis Yibin estis la ĉefa antikva akva vojo. La vojaĝo laŭ tiu akva vojo estis malfacila kaj danĝera same kiel laŭ la montvojo. Kvankam nun serpentumas ŝoseoj ambaŭborde de la rivero, tamen ne ekzistas regula aŭtobuso inter iuj guberniaj urboj, tial nia vojaĝo laŭ la akva vojo estas plej oportuna.

TRAFIKO PER REORDIGO DE RIVEROJ

Vojaĝi laŭ akva vojo estas ĝenerale en Sichuan-provinco. La agri-


kulturo de Sichuan komenciĝis de la baseno de Minjiang (Mingĵang)-rivero. La reĝoj de la diversaj dinastioj en tiu regiono unue reordigis riverojn en sia regado de la regiono kaj poste ilia sukceso famis tra la tuta lando. La riveroj estas naturaj baroj kaj ankaŭ vojoj kondukantaj al aliaj regionoj.

Minjiang-rivero fontas el Gonggong-monto kaj Langjia (Langĝja)-monto de Minshan-montaro en Songpan-gubernio de Sichuan-provinco kaj longas 735 kilometrojn. Ĝia malsupra parto kuniĝas ĉe Yibin kun Jinsha (Ĝinŝa)-rivero kaj enfluas en Yangzi-riveron. Reordigo de Minjiang-rivero por trafiko vidiĝas en historiaj libroj de la pasintaj dinastioj. Multaj antikvaj mitoj kaj legendoj cirkulas inter la loĝantoj ambaŭborde de la rivero generacion post generacio. La geografia verko de Ĉinio "Shan Hai Jing (Libro pri Montoj kaj Maroj)" antaŭ pli ol

2 000 jaroj diras: Minjiang-rivero torentas el Minshan-montaro, tie staras altaj montoj kun 9 pordoj gardataj de besto Kaiming. La besto havas homan vizaĝon kaj tigrajn ungojn kaj gardas la lokon loĝatan de dioj. Tiu mito pri rivera fonto cirkulis ambaŭborde de Minjiang-rivero en miloj da jaroj, ĝi kaj multaj aliaj mitoj havigis misteran koloron al la loĝantoj en ekspluatado de tiu bela regiono.

Legendo diras, ke la unua reĝo de Shu-regno estis Cancong, la lasta estis Kaiming, la tempodaŭro inter la du regperiodoj estis 34 000 jaroj, ĉiu reĝo regis centojn da jaroj kaj fariĝis feo poste. Kiam Wangdi estis la reĝo de Shu-regno, persono nomata Bieling mortis, lia kadavro flosis sur rivero kontraŭflue kaj reviviĝis en Shu-regno. Wangdi petis lin funkcii kiel ĉefministro de la regno. Tiam okazis inundo en Shu-regno, Wangdi sendis lin reordigi la akvon. Post lia foriro Wangdi ekamis lian edzinon. Tio poste hontigis Wangdi, li do cedis sian tronon al Bieling. Kiam Bieling surtroniĝis, li prenis Kaiming kiel eraon de sia regtempo, tiu tempo estis en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.). Forpreninte la eksteran veston de mito, oni povas vidi, ke ĉiu reganto de Shu-regno devis fari kontribuon en akvoreguligo.

En la antikveco la ĉefa trafiko en la regiono estis akva. Historiaj libroj diras: En 316 a.K. (13-a jaro de la regperiodo de Huai-reĝo de Chu-regno), post kiam Qin-regno pereigis Bashu-regnon, la ekonomio de la regiono progresis multe. Post nelonge, Sima Cuo gvidis pli ol 100 000 soldatojn veturantajn per dek miloj da ŝipoj, kun 6 milionoj da hu-oj da rizo (hu-o estis greno



mezur-unuo de la antikva Ĉinio), por ataki Chu-regnon, parto de liaj ŝipoj estis veturinta orienten de la urbo Chengdu laŭ Minjiang-rivero kaj trapasinta Yibin. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj, la akvoutiliga fakulo Li Bing faris irigacian konstruadon en Shu, multaj konstruaĵoj de tera kaj akva trafiko troviĝis ambaŭborde kaj precipe okcidente de Minjiang-rivero, kie estis la prospera regiono de Shu-regno.

Hodiaŭ, ankoraŭ veturas ŝipoj sur Minjiang-rivero. Oni ofte povas vidi lignajn flosojn sur la rivero. La rivero transportas lignon kaj vigligas la ekonomion de ĝiaj supra kaj malsupra basenoj.

ZHONGYAN DE QINGSHEN

Qingshen, 80 kilometrojn sude de la urbo Chengdu, estas la grava haveno de Minjiang-rivero. Pasintece vojaĝantoj veturantaj laŭ Minjiang-rivero de Chengdu suden tranoktis en Zhongyan de Qingshen-gubernio.

La gubernio Qingshen ("Qing" signifas verdan, "shen" dion) ricevis la nomon pro tio, ke la popolanoj de la gubernio kutimis planti morusujojn kaj bredi silkraŭpojn. La antaŭaj loĝantoj de tiu loko kultis la dion Cancongshi, dirante, ke li en verdaj vestoj ofte iris inter la popolanojn kaj konsilis al ili disvolvi la aferon pri morusuj-plantado kaj silkraŭp-bredado. Post la morto de Cancongshi, oni rigardis lin kiel dion, ĉiujare kultis lin kaj konstruis la templon Benanto Cancong (alino Qingyi Tuzhu). Tial, la posteuloj nomis la gubernion Qingshen. Ĝis la meza periodo de la 17-a jarcento, ankoraŭ popularaj estis morusuj-kulturo kaj silkraŭp-bredado. Tiam morusujoj kreskis ĉe kortoj kaj silkraŭpoj brediĝis en domoj.

Zhongyan, ĉe la orienta bordo de Minjiang-rivero kaj 9 kilometrojn sude de la gubernia urbo Qingshen, estas rigardata kiel plej bela loko de arboj kaj fontoj de la okcidenta Sichuan. Zhongyan konsistas el la supra, meza kaj malsupra partoj. En Tang-dinastio (618-907) oni konstruis templojn en Zhongyan, en la Norda Song-dinastio (960-1127) kaj

Suda Song-dinastio (1127-1279) oni faris grandskalan plikonstruadon, en Ming-dinastio (1368-1644) multaj temploj, skulptitaj budhoj kaj homfiguroj sur montaj rokmuroj kaj ŝtonaj epitaĵoj troviĝis en la montoj, tial la loko fariĝis turisma vidindejo de Sichuan-provinco. Forlasinte la gubernian urbon, ni aŭte veturis al la urbeto Ruifeng (Jufeng) sur la okcidenta bordo de Minjiang-rivero kaj poste veturis per ligna ŝipo al Zhongyan. Estis nemultaj la turistoj al Zhongyan kaj kvieto regis en la montoj. Ambaŭflanke de la padoj prosperis verdaĵoj kaj staris groteskaj ŝtonegoj. Ni grimpis laŭ zigzaga pado, ĉirkaŭe kantadis birdoj kaj cikadoj, murmuris klaraj fontakvoj, ĉio ĉi tio portis al la vizitantoj plezuron. Ju pli supren ni surgrimpis la monton, ni vidis des pli multajn famajn antikvaĵojn, interalie troviĝis multaj skribaĵoj faritaj de famuloj de Song-dinastio. Sur monta rokmuro klare videblis tri grandaj ideografiaĵoj "Huan Yu Chi" (Fiŝ-veka Lageto) skribitaj de la granda literaturisto Su Dongpo de Song-dinastio. Pli malsupre estis la lageto. Oni diris, ke fiŝoj sin kaŝis sub la roko kaj, kiam oni manfrapis sur la lageto, fiŝoj ekaperis en la akvo. Nun ne estas fiŝoj en ĝi, kaj turistoj manfrapas por sin amuzi.

SURROKMURAJ MIL BUDHOJ EN JIAJIANG

Pli ol 20 kilometrojn sudokcidente de Qingshen estas Jiajiang (Ĝjaĝjang), tera kaj surakva trapasejo inter la riveroj Qingyi kaj Minjiang. Okcidente de la gubernia urbo Jiajiang troviĝas loko Gujingkou sur la norda bordo de Qingyi-rivero. Legendo diras, ke antaŭ 2 300 jaroj, Huiwen-reĝo de Qin-regno fondis prefektujon Shu kaj transloĝigis dek milojn da familioj de la baseno de Jinghe-rivero en Shaanxi al Shu. Parto de la nordanoj atingis Qingyi-riveron kaj estis kaptita de nostalgio. Ili sopiris Jinghe-riveron kaj volis reveni al sia hejmloko. Por konsoli la transloĝantojn la eskortantaj oficiroj diris, ke tie estas la suda fluo de la antikva Jinghe-rivero, la nordanoj ĝoje trinkis la akvon kaj fiksloĝis en la



Antikva vidindaĵo en Zhongyan

loko.

Apud Gujingkou nun ekzistas sekcio de antikva surrokmura vojo ĉe la rivero. La vojo sur la norda danĝera rokmuro alfrontas sude torrentan fluon kaj konstruiĝis el longaj ŝtonpecoj. Pasantoj sur la vojo sentas teruron kaj tremas la du gamboj. Sur la rokmuro supre de la vojo videblas serioj da truoj samnivele kaj samdistance, kiuj estis lasitaj de la tiama ligna surrokmura vojo. Post Tang- kaj Song-dinastioj, la ligna vojo estis difektita, oni konstruis la ŝtonan. Poste, oni senĉese riparigis ĝin. Apud la vojo nun troviĝas skribaĵo sur ŝtonplato de Qing-dinastio pri la vojoriparo.

Ambaŭborde de riveroj en Sichuan ofte videblas budhaj kavernoj kaj statuoj, kio eble spegulis psikon regi inundon per ŝtonoj kaj adoron al ŝtonoj. Adori ŝtonegojn estis primitiva religia fenomeno aperinta en la antikva orienta mondo. Tio ŝajne havis originon kun la adoro al la suna dio. La piramidoj de Egiptio, la grandaj budhostatuoj de Hindio kaj multaj grandaj budhostatuoj de Ĉinio montris adoran psikon de la homoj al la grandaj




Flosoj sur rivero

nevenkeblaj lumoj kaj naturo. Sur la orienta kaj okcidenta rokmuroj de Gujingkou viciĝas centoj da antikvaj ŝtonaj kavernoj kun mil grandaj kaj malgrandaj budhostatuoj. Nun bone konserviĝas 162 ŝtonaj kavernoj kun 2 770 budhostatuoj, ili formis koridorojn de budhostatuoj. Iuj kavernoj havas po unu budhostatuon, aliaj po plurajn, eĉ po dekojn aŭ centojn. En iuj kavernoj troviĝas statuoj de budhoj, homoj, imperiestroj kaj reĝoj. La diversspozaj kaj delikate skulptitaj statuoj montras altajn teknikojn de la ŝtonskulpturo kaj pentrado de la antikva Ĉinio kaj spegulis la historion de kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La skulptado de ŝtonaj budhostatuoj ĉe Jiajiang-rivero komenciĝis en Sui-dinastio (581-618), prosperis en Tang-dinastio kaj daŭris ĝis Ming- kaj Qing-dinastioj. En la pasintaj pli ol 1 000 jaroj, la budhostatuoj spertis ventan kaj pluvan erozion kaj rigardis aron post aro da pasantoj.

La rivero torentas senĉese. La antaŭaj ekspluatantoj diligente laboris por faciligi la akvan kaj teran trafikon, ne lasante eĉ sian nomon, sed ilia merito kunfandiĝis kun la lokaj pejzaĝoj. ■

Skulptitaj budhoj kaj antikva kornica vojo en Gujingkou





Farado de bambua artaĵo en Qingshen-gubernio

Ŝtona budhostatuo



Kolportisto de bambuaj plektaĵoj



Jiaotai-halo, Kunning-palaco kaj edziĝo de imperiestroj

Teksto de MU YI


Fotoj de YAN JIN

KIAM vi venos en la postajn tri palacojn, vi aŭdos belsonan sonoradon de horloĝoj. La sonoj venas el la kvadrata Jiaotai-halo situanta post Qianqing-palaco.

En Qing-dinastio (1644-1911) Jiaotai-halo estis loko, kie edzino de imperiestro akceptis gratulantojn en la Novjara Tago kaj la datreveno de sia naskiĝtago. De post 1736 la loko fariĝis konservejo de la imperiestraj sigeliloj. Tiuj sigeliloj estis tenataj de la kabineto kaj oni povis uzi ilin nur ricevinte permeson de imperiestro. Nun en la halo oni povas vidi 25 kubajn kestojn tegitajn per flava silkaĵo, en kiuj konserviĝas sigeliloj de imperiestroj.

Okcidente en la halo staras tur-

PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-roj 9 kaj 10 en la plano signas Jiaotaihalon kaj Kunning-palacon.

forma horloĝo farita en 1798. La horloĝo en alto de 5 metroj havas sur sia dorsa flanko ŝtupareton, laŭ kiu oni povas supreniri por streĉi la risorton. Ĝi anoncas tempon en ĉiu kvaronhoro kaj ĝi funkcias precize ĝis hodiaŭ. Oriente en la halo estas kupra klepsidro. Tia tempo- mezurilo estas inventita de ĉinoj antaŭ 3 000 jaroj. Post 1736 la klepsidro ĉesis funkcii.

Malantaŭ Jiaotai-halo kuŝas Kunning-palaco. En Ming-dinastio (1368-1644) ĝi funkciis kiel loĝejo de imperiestra edzino. Ankaŭ imperiestraj kromedzinoj povis loĝi tie kondiĉe de konsento de la imperiestra edzino. En la fino de Ming-dinastio, kiam la kamparanaj ribelantoj konkeris Pekinon, edzino de la lasta imperiestro de la dinastio sin pendigis ĝuste en tiu palaco. En Qing-dinastio Kunning-palaco estis loĝejo de imperiestra edzino nur nominale, sed fakte ŝi loĝis aliloke escepte de la unua nokto de la nupto. Se kulpis kromedzinoj de la imperiestro, ŝi punis ilin en tiu palaco. La palaco estis uzata ĉefe por kultado.

La dekoracio de Kunning-palaco estas malsama ol tiu de aliaj palacoj: Ĝia pordo estis instalita ne meze, sed iom oriente. Sude, okcidente kaj norde en ĝia okcidenta ĉambro estas terlito masonita en la restituado de la komenca periodo de Qing-dinastio laŭ la manĉuraj moroj. La imperiestroj kaj iliaj edzinoj de Qing-dinastio estis superstiĉaj kaj en la palacoj ĉie vidiĝas

preĝoĉambroj kaj kultejoj. En Kunning-palaco estis plej multe da statuoj de kultataj dioj. En la palaco okazis ĉiutage matena kaj vespera kulto, kaj cetere tie okazis ankaŭ novjara, printempa kaj aŭtuna kultoj ĉeestataj persone de la imperiestro kaj lia edzino. Inter la 15 kultataj idoloj estis Ŝakjamunio kaj la mongolaj dioj. Antaŭ la lignaj tabuloj kun la nomoj de la kultatoj estis tabloj kun delikataj kukoj, vinoj, oraj kaj arĝentaj ingotoj, silkaĵoj k.a. Dum kultado oni devis buĉi porkon en la palaco akompanate de kantado kaj muziko. En la palaco estis forno, sur kiu oni kuiris porkaĵon kaj vaporumis kukon. Post kultado la imperiestro kaj korteganoj frandis viandon kaj kukon en la palaco. En la unuaj jaroj la prizorgantoj de kultado ŝtele vendis la porkaĵon, sed poste tio estis malpermesita.

La orienta ĉambro de Kunning-palaco estis destinita speciale por la uzo de imperiestroj en la nupta tago. Kvar imperiestroj de Qing-dinastio Shunzhi, Kangxi, Tongzhi kaj Guangxu pasigis la nuptan tagon en tiu ĉambro. La nuna ĉambro tenas la originalan dekoracion aranĝitan por edziĝo de la imperiestro Guangxu (1875-1908 sur la trono).

La orienta ĉambro estas septita en du partojn. Sub la suda fenestro estas vasta terlito kaj ĉe la norda muro en la orienta parto estas neluksa trono. Sub la norda muro en la okcidenta parto kuŝas granda



Parto de Jiaotai-halo kaj Kuning-palaco

lito gravurita je drakoj kaj feniksoj kaj sur la lito matracoj el broditaj ruĝaj silkoj, stako da litkovriloj el flava kaj ruĝa sateno, super la lito pendas multkoloraj silkaj vualoj kaj kurtenoj el ruĝa brokato. La ruĝa fono impresigas la ĉambron varme kaj gaje.

En Qing-dinastio la ceremonioj por la edziĝo de imperiestroj estis komplikaj. Kiam elkreskis imperiestro, kiu surtroniĝis en sia knabeco, liaj patrino kaj proksimaj parencoj interkonsiliĝis por elekti por li edzinon. Kiam la afero estis decidita, oni devis okazigi ceremoniojn de transdono de donacoj al la gepatroj de la fianĉino kaj ceremonion de oficiala nomumo, la bonvenigan ceremonion, nuptan ceremonion, gratulan ceremonion kaj festenan ceremonion. La plej

luksa estis la bonveniga ceremonio. La ceremonia gvardio el miloj da homoj paradis preskaŭ tra la tuta urbo.


Historiaj kronikoj notis la nuptan ceremonion de la imperiestro Guangxu. En tiu tago, servate de kvar nobelinoj, la novedzino de la imperiestro tualetis kaj venis per palankeno al Kuning-palaco lukse dekoraciita: La muroj estis arĝente farbitaj, ĉe la pordo pendis du grandaj lanternoj kaj sur la ore tegitaj pordklapoj algluiĝis paperoj kun la ideogramo signifanta "duoblan feliĉon". Tuj kontraŭe al la pordo kaj en la koridoro oriente de la ĉambro por la novgeedzoj staris po unu ligna ekranego, sur kiu algluiĝis ruĝa papero kun ora ideogramo signifanta "duoblan feliĉon". Eniris la imperiestro en festa

kostumo kaj sidis sur la maldekstra parto de la terlito, vid-al-vide al sia edzino, kiu sidis sur la dekstra parto de la lito. Ilin servis nobelinoj dum la festeno. La servicoj estis luksegaj, faritaj el pura oro aŭ fajna porcelano. Kiam la novgeedzoj reciprokis toston unu al la alia, la gvardianoj kaj iliaj edzinoj kantis gratulan kanzonon ekster la halo. Nur tiam la novgeedzoj povis havi ripozon.


La novgeedzoj devis iri esprimi dankon kaj bondezirojn al la imperiestra patrino. La imperiestro devis kunvoki korteganojn en Taihe-halo por celebri la nupton, dum la korteganoj kaj fremdlandaj delegitoj devis letere gratuli la imperiestran patrinon, la imperiestron kaj lian edzinon. La imperiestro devis dekreti anoncon al la tuta lando. Post tio la imperiestro kaj lia patrino donis festenon en Taihe-halo kaj Cining-palaco (loĝejo de la imperiestra patrino) respektive por regali la korteganojn, la gepatrojn de la novedzino kaj nobelinojn.

Sed la nupta ceremoniaro ankoraŭ ne venis al sia fino. Post tiuj ceremonioj estis tritaga spektaklo. La prezentadon rigardis imperiestro, liaj novedzino kaj kromedzinoj, la imperiestra patrino kaj korteganoj. Al la spektaklo devis servi ĉiuj famaj geaktoroj de Pekino.


La elspezo por la edziĝo de imperiestro estis terure granda. En 1872, kiam la imperiestro Tongzhi edziĝis, la ŝtato jam multe malpotenciĝis, sed la edziĝo konsumis 11 milionojn da taeloj da arĝento. La lasta imperiestro de Qing-dinastio Puyi (1909-1911 sur la trono) edziĝis post la pereado de la dinastio, sed la ceremoniaro konsumis 400 000 juanojn, kiuj egalvaloris al 5 milionoj da kilogramoj da tritika faruno. Tiom da faruno sufiĉas por 40 mil homoj en unujara manĝado. La efektiva elspezo estis multe pli granda ol la raportita. Laŭ la sumo por la detroniĝinta imperiestro oni povas facile taksi la diboĉan luksegon por la edziĝoj de regantaj imperiestroj en la prospera periodo de la dinastio. ■




En Jiaotai-halo



Ĉambro por nupto de imperiestro en Kuning-palaco



Terlito en la ĉambro por nupto, kie imperiestro kaj lia novedzino tostis por sia geedziĝo



Koloraj kurtenoj por la lito en la geedziĝa ĉambro
Foto de LUO WENFA

Umefloroj

de LI QIANG

Antaŭ 3 000 jaroj ĉinoj komencis kulturi umearbojn. Umefloro ne nur plezurigas homojn per sia eleganteco, sed eĉ kuraĝigas homojn per sia florado en frosta vintro. La ĉinoj rigardas ĝin kiel simbolon de fideleco kaj nobleco. Umefloro, pino, kaj bambuo estas laŭdataj kiel amikoj en frosto, kaj umefloro, bambuo, orkideo kaj krizantemo nomataj "Kvar Nöbluloj". En Ĉinio estas pli ol 200 specoj de umefloroj. La poŝtmarka serio prenis ok el ili kiel siajn bildojn dense kolorigitajn sur silko per delikatiniaj strekoj, kun forta nacia gusto. La serio el ses pecoj kaj unu bloko estis emisiitaj la 5-an de aprilo 1985.

